

januaro 1969

62-a jaro

n-ro 758 (1)

esperanto

oficiala organo de

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176, rotterdam-2, nederlando - red. v. sadler



*Canon
Lescaut*



Vi trovos

en tiu ĉi unua numero de 1969 ampeksan ĉefartikolon, kiu donas superrigardon de la eksteraj rilatoj de UEA dum la lastaj jardekoj kaj difinas la taktikon ankaŭ por la estonteco. Apartan intereson en ligo kun la lastatempa hinda propono al Unesko havas la iniciato raportita sur paĝo 5. La konsiloj de komitatano J. C. Wells, aliflanke, (p. 6-7) servu por plibonigi la eksterajn rilatojn sur nivelo loka aŭ individua.

Ankaŭ turisman akcenton havas la nuna numero: ĝeneralan alvokon faras sur p. 4 d-ro Hj. Unger, dum la artikolo sur p. 8-9 denove ĵetas rigardon al la multaspekta kongreslando 1969.

Bildojn ni dankas al: Welt auf Reisen (4, 16), L. Kantonen (8-9) kaj S. Hodková (6).

Enhavo

- 1 Niaj rilatoj kun Unesko kaj UN (Lapenna)
- 4 Esperanto por la turismo (Unger)
- 5 Nova iniciato pri alfabetoj
- 5 Silezia Esperanto-teatro naskita
- 6 Kiel fronti intervjuiston: konsiloj (Wells)
- 7 Okcidentaj delegitoj konsternitaj
- 8 Turku – urbo de la Oficiala Postkongreso (Ahomäki)
- 10 Alvoko al unuopaj esperantistoj (Carlén)
- 11 Leteroj de legantoj
- 11 Mortis Upton Sinclair (nekrologoj)
- 12 Recenzoj
- 12 Informoj de CED
- 14 Laste aperis... (novaj eldonajoj)
- 15 Loke – fake – persone (mallongaj novaĵoj)
- 16 54-a Universala Kongreso, Helsinki, Finnlando, 1969
- 16 21-a IFEF-Kongreso, Avignon, Francujo, 1969
- 17 La Juna Vivo
- 18 Esperanto en radio
- 19 Oficiala informilo n-ro 419: Elekto de komitatanoj B
- 20 Anoncetoj

La kovrilo

Notinda evento en la Esperanta teatro estis dufoja lastatempa prezento de versdramo "Manon Lescaut", verkita de la ĉeĥoslovaka aŭtoro Vítězslav Nezval laŭ la konata romano de Abbé Prévost (ankaŭ ĝi siatempe aperinta en la Internacia Lingvo). Prezentis ĝin membroj de la Silezia Teatro en Opava, Ĉeĥoslovakujo. Sur la fotoj: Aranka Lapesová en la rolo de Manon, kun (supre) Roman Mecnarowski (Duval) kaj (sube) Jaromír Polcík kiel kavaliro Des Grieux. Fotis: Josef Solnický. (Vidu p. 5)

NOVJARA BONDEZIRO

En la nomo de la Estraro kaj en mia propra mi tutkore deziras al ĉiuj niaj landaj, fakaj kaj lokaj organizaĵoj, al la kolegoj en la Komitato kaj al ĉiuj ĉefdelegitoj, delegitoj, komisiitoj, geoficistoj kaj aliaj funkciuloj sukcesplenan laboron por la Internacia Lingvo en 1969.

Al la tuta membraro multe da prospero kaj persona feliĉo!

Prof. d-ro Ivo Lapenna, Prezidanto

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1883-1910).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Redaktoro: D-ro V. Sadler.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 18,75 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 25,— gld.). Unuopa ekzemplero: 1,— gld.

Banko: Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Girkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 23 27 88.

Telegramoj:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Presejo: Drukkerij Zwagers, Rotterdam-6.

Legantoj en ĉirkaŭ 80 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj kaj kulturaj rilatoj: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Middx, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado: S-ro E. L. M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano por diskonigo de la agado de UEA: S-ro E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo. Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj: S-ro G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 4, Germanujo.

Estrarano pri turismo: S-ro M. Jaumotte, 44 de Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

Estrarano pri lernejoj: S-ro J. Toczyski, skr. p. 57, Gdańsk 1, Polujo.

Estrarano pri financoj: S-ro E. J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj: D-ro Peter Zlatnar, Rimska 7/II, Ljubljana, Jugoslavio.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro Ulrich Lins, D-5 Köln-Dellbrück, Gemarkenstr. 146, Germanujo.

Niaj rilatoj kun Unesko kaj UN

Okaze de la Nova Jaro

La 31-an de decembro finiĝis la Jaro de Homaj Rajtoj. Laŭ la invito de Unuiĝintaj Nacioj, UEA — same kiel nombro da aliaj Neregistaraj Organizaĵoj (NRO) — partoprenis per ampleksa programo kun emfazo je la kulturaj rajtoj kaj lingva egaleco. Kompleta trarigardo pri la rezultoj de tiu ĉi lasta granda kampanjo povos esti prezentita nur post kelkaj semajnoj. Kiel en la antaŭaj similaj agadoj, tre verŝajne denove montriĝos, ke la kontribuo de UEA superis tiun de kiu ajn alia NRO, eĉ de pluraj kune. Kaj same verŝajne ankoraŭfoje okazos, ke la burokrata aparato de UN kaj Unesko — la du ĉefaj internaciaj agentejoj de angla-franca lingva imperiismo — klopodos prisilenti, malgravigi aŭ misprezenti la atingojn, ĉar ili estas ligitaj al Esperanto.

Pluraj, do, starigis la demandon, ĉu en tiaj kondiĉoj havas sencon partopreni en agadoj, iniciatitaj de UN aŭ Unesko, dediĉi al ilia realigo multe da fortoj kaj eĉ elspezi tiucele parton de la disponeblaj financaj rimedoj. Kelkaj eĉ volus scii, kian valoron entute havas la rilatoj kun tiaspecaj interŝtataj organizaĵoj, kiuj unuflanke postulas, sed aliflanke konscie provas subfosi per misuzo de povo kaj kelkfoje eĉ per rektaj malveroj, absolute ĉion, kio endanĝerigas la instituciigitajn lingvajn monopolojn.

Rompi la murojn de izoliteco

1920 Necesas memori, ke post la intervenoj ĉe la Ligo de Nacioj en la fruaj dudekaj jaroj (1920-25), ŝuldataj ĉefe al prof. E. Privat, komenciĝis ĉiam pli granda izoligo de la Esperanto-Movado disde de la tiamaj internaciaj instancoj. La Dua Mondmilito nur kompletigis tiun negativan procezon. La Peticio favore al Esperanto, iniciatita tuj post la milito, estis unu el la fortaj instrumentoj por rekomenci la konstruadon de la moderna Esperanto-Movado el la ruinoj. Miloj da uzantoj de la lingvo ekaktivis. Centmiloj denove aŭdis pri la Internacia Lingvo. *Tio per si mem estis pozitiva.*

1950 En 1950 la Peticio estis prezentita al UN kaj en la sama jaro transdonita al Unesko. Kompreneble, la burokratoj en Parizo volis entombigi ĝin, sed ni sukcesis per juraj argumentoj, objektivaj dokumentoj kaj publika premo eligi ĝin el la arkivoj. En 1952 kaj 1954 la afero troviĝis en la tagordo de la Generala Konferenco de Unesko. Okaze de la du sesioj denove estis mobilizitaj ĉiuj pozitivaj fortoj en ĉeno da agadoj, kiuj kompletigis unu la alian: en Parizo (1952) altnivela publika diskuto, raportoj en la gazetaro, radio-intervjuoj, CED-dokumentoj al ĉiuj delegacioj, multnombraj personaj kontaktoj, parolado en la Konferenco mem k.a.; en Montevideo (1954) impona Ekspozicio, prelegoj, radio-elsendoj, pliaj dokumentoj de CED, sennombraj personaj intervenoj, miloj da informoj kaj artikoloj en la monda gazetaro antaŭ, dum kaj post la Konferenco, precipe en ligo kun la hontindaj eventoj kaj malsukceso de la 4-a de decembro en la Programkomisiono, kaj la triumfa venko en la fina kunsido de la 10-a de decembro.¹

Milionaj amasoj tra la mondo (en la plej ĝusta senco de la vorto) legis aŭ aŭdis kun simpatio pri la Internacia Lingvo. *Kaj tio per si mem estis elstara pozitiva rezulto.*

1954 La 8-an de decembro 1954 la Generala Konferenco unuanime decidis, ke Unesko establu konsultajn rilatojn kun UEA. Tio aŭtomate metis la Asocion en apartan kategorion de rilatoj ankaŭ kun UN kaj aliaj interŝtataj organizaĵoj. Krome, ĝi ebligis pli intimajn kontaktojn kun pluraj NRO. *Ni rompis la murojn de izoliteco kaj alpaŝis la scenejon de mondaĵ eventoj.* En Unesko kaj en aliaj organizaĵoj jam pli ol 14 jarojn ni ne preterlasas unusolan okazon por trafe kaj kompetente aŭdigi nian voĉon en asembleoj, konferencoj, komisionoj kaj aliaj organoj. Kvankam la satelitoj de lingva imperiismo sukcesas de tempo al tempo forigi la lingvan demandon el formalaj tagordoj — unuavice per taktiko de prokrasto — tamen Esperanto daŭre "ĉeestas" kaj ne plu foriras el la fakta tagordo. *Tio per si mem signifas plian rimarkindan pozitivan atingon.*

La Rezolucio de la 10-a de decembro 1954² signifis la maksimumon atingeblan ĉe Interŝtata Organizaĵo kiel Unesko, kiu en tiaj aferoj neniam povas transiri la limojn de simplaj rekomendoj, jure nedevigaj. Ĝi estis la unua oficiala rekono ne de iaj abstraktaj eblecoj de Esperanto en nebula estonteco, sed de konkrete "atingitaj rezultoj" per la Internacia Lingvo sur la kampo de interpopolaj intelektaj interŝanĝoj. Slavice, tiu principa rekono malfermis multajn pordojn, ĉie fortikigis la poziciojn de Esperanto, helpis al restarigo de Esperanto-organizaĵoj en pluraj landoj, en kiuj ĝis tiam ili estis malpermesitaj kaj la lingvo apenaŭ tolerata. Krome, la Rezolucio havas daŭran valoron kaj estas senĉese utiligata por apogi kiun ajn seriozan paŝon en niaj ĝeneralaj agadoj. *Ĝi estis kaj restas unuaranga pozitiva akiro.*

(1) Detaloj en la revuo "Esperanto", februaro, 1955.

(2) La teksto de la Rezolucio troviĝas ĉiujare en la Jarlibro de UEA.

Niaj rilatoj kun Unesko kaj UN

Tri grandaj kampanjoj

En la kadro de la konsultaj rilatoj, kaj grandparte ankaŭ surbaze de la Rezolucio de la 10-a de decembro, UEA kaj ĝia junulara sekcio multe vastigis siajn eksterajn rilatojn kaj organizis aron da agadoj.

1959 (i) En 1958-59, okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, UEA organizis mondiskalan kampanjon sub gvido de kompetenta Organiza Komitato, kiu laboris laŭ speciala programo. La ĉefaj atingoj estis: Internacia Patrona Komitato de 124 plej eminentaj personoj de la publika vivo, scienco, literaturo, artoj kaj ĝenerala kulturo; kelkaj nacilingvaj libroj pri la aŭtoro de Esperanto; 10 000 ekzempleroj de broŝuro pri la Zamenhof-Jaro en diversaj lingvoj; 300 000 ekz. de memoriga glumarko; miloj da artikoloj en gazetoj, programoj en radio kaj televido; novaj stratoj aŭ placoj laŭ la nomo de Zamenhof; publikaj celebradoj en centoj da urboj k.a.³ La kulmino estis atingita fine de 1959, kiam la *Plenuma Komitato de Unesko deklaris la aŭtoron de la Internacia Lingvo unu el la "grandaj personecoj de la homaro"* kaj alvokis ĉiujn memorigi la 100-jaran datrevenon de lia naskiĝo. Ĝi estis la plej grava oficiala rekono al la genia grandeco de d-ro L. L. Zamenhof. *Nova unuaranga rezulto kun daŭra valoro, neniel realigebla sen la atingoj de 1954.*

1965 (ii) En 1965 UEA partoprenis, laŭ la propono de UN kaj Unesko, en la ĝenerala programo por la Jaro de Internacia Kunlaboro (JIK), sed ankaŭ ĉi-foje laŭ propra plano, detale elaborita kaj kun akcento unuavice sur la lingva problemo.⁴ Nova ondego da artikoloj kaj informoj en la gazetaro; glumarko en 80 000 ekzempleroj; valoraj verkoj en la serio Oriento-Okcidento; aro da dokumentoj de CED, el kiuj CED/7 (Bazaj Faktoj pri la Internacia Lingvo) aperis en 13 eldonoj en la lingvoj Esperanto, angla, hispana, franca, hebrea, pola, japana kaj nederlanda en pluraj dekmiloj da ekzempleroj; afiŝoj en naciaj lingvoj kun taŭgaj sloganoj; aranĝoj dum la UK, landaj kongresoj kaj internaciaj konferencoj. La baza ideo de tiu-ĉi kampanjo estis simpla kaj klara: *vastigi kaj profundigi la internacian kunlaboradon estas eble nur per la ĝeneraliĝo de la uzo de Esperanto kiel neŭtrala kaj tial sole-racia solvo de la lingva obstaklo.* Tial la kulmina punkto estis la konata Propono al UN, kiun subskribis 920 954 individuoj (multaj vere eminentaj) el 74 landoj kaj 3 843 organizaĵoj kun 71 165 500 membroj. La Propono, kune kun aparta Memorando en 4 naciaj lingvoj kaj en Esperanto, estis oficiale transdonita al la Sekretariato de UN la 6-an de oktobro 1966. La transdono mem siavice ebligis nombron da publikaj aranĝoj, informadon al ĉiuj registaroj de la Ŝtatoj-Membroj (kaj ankaŭ de aliaj), kaj elvokis interesigon de la presagentejoj kaj de pluraj gravaj gazetoj.⁵ Tute senkonsidere al la starpunkto de la Sekretariato de UN kaj al la eventualaj sekvoj (pri kio poste), la tuta agado kaj precipe la amasa Propono — la plej granda iam prezentita al kiu ajn interŝtata instanco laŭ privata iniciato — donis al ni unikan okazon efike prezenti ĉiujn aspektojn de la lingva problemo kaj la solvon, por kiu ni pledas, ne nur al la popolamasoj kaj al multaj fakaj medioj, sed ankaŭ al oficialaj internaciaj instancoj kaj, praktike, al ĉiuj registaroj de la mondo. Krome, ni montris la forton de la Esperanto-Movado, ĝian organizitecon kaj efikecon, kio transformas ĝin ĉiam pli en atentindan internacian premgrupon. *Kaj tio per si mem havas netakseblan pozitivan valoron en la hodiaŭa mondo, en kiu sociaj premgrupoj ludas ĉiam pli rimarkeblan rolon.*

1966 (iii) Ne ripozante post la streĉa trijara laboro (1964-1967) por la JIK — vere, oni ne forgesu, ke tiaspecaj agadoj postulas amason da tempo kaj da energio — ni tuj komencis la preparojn por la Jaro de la Homaj Rajtoj (JHR) en 1968. La laborplano por tiu ĉi okazo konsistis el pluraj punktoj rilatantaj ĉefe al kulturaj rajtoj laŭ la fundamenta tezo: *Por la Internacia Lingvo — Kontraŭ la Lingva Diskriminacio.* La vasta aktivado laŭ la plano, praktike ne nur komplete plenumita, sed ankaŭ certagrade transpasita (ĉar dum la realigado prezentigis novaj eblecoj, kiujn ni efike utiligis), havigis al la Internacia Lingvo amason da simpatioj en medioj ĝis nun apatiaj, kaj en pluraj kazoj ankaŭ eksplicitajn oficialajn kaj neoficialajn apogojn. La kulmino estis atingita la 10-an de decembro per la publikigo de la unua numero de la prestiĝa nova revuo "La Monda Lingvo-Problemo", kiu siavice certe kaŭzos plian interesigon pri la brulanta lingva problemo en la sekvantaj jaroj, firmigos la poziciojn de la Internacia Lingvo en la ŝlosilaj pozicioj de la kultura vivo, kreos por ĝi novajn simpatiojn kaj altiros al Esperanto freŝajn intelektajn fortojn. Plue, *nia ribelo kontraŭ la kulturalan diskriminacion*, kiu kelkfoje ricevas formojn de kultura genocido, kaj kontraŭ la instituciigitajn lingvajn privilegiojn de la potenculoj en internaciaj rilatoj, necese ĉiam pli inklinigos al la lingvo la favoron de tiuj

(3) Detaloj en la Jarlibroj (Estraraj Raportoj) 1958-60, en la revuo "Esperanto", 1959, kaj en Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro, CED, 1960.

(4) Detaloj en la Jarlibro de UEA, 1965, Dua Parto, p. 77-79.

(5) Detaloj en la Jarlibroj de UEA, 1966, Dua Parto, p. 46-49, kaj 1967, Dua Parto, p. 45-46.

Transformi negativon al pozitivo

kreskantaj ribelaj junaj fortoj, kiuj komprenas, eble ankoraŭ ne tute klare, ke la homaro ne povas plu longe vivi kun unu piedo — rilate la teknikan progreson — en la 21-a jarcento, kaj kun la alia — rilate la politikajn, sociajn kaj kulturajn instituciojn — en la 19-a. Ĉio ĉi, ankoraŭfoje per si mem, estas pli ol pozitiva: ĝi estas esenca por la Internacia Lingvo kiel unu el la plej gravaj faktoroj en la reorganizado de la mondo.

Konkluda analizo

Kvankam la konkludoj logike sekvas el la skize tuŝitaj etapoj en la evoluo de niaj rilatoj kun Unesko kaj UN, ne estas senutile fari koncizan resumon:

Antaŭ ĉio necesas akcenti, ke en la menciitaj, kaj en ĉiuj aliaj multnombraj aktivadoj en la sfero de niaj eksteraj rilatoj, la ĝenerala gvidlinio de UEA estas kaj restas iniciati aŭ apogi nur tiujn programojn, kiuj efektive respondas al la celoj kaj idealoj de la Esperanto-Movado.

Due, absolute ĉiuj el niaj kampanjoj aŭ malpli ampleksaj agadoj, pozitivaj per si mem, signifis samtempe plian firmigon de la pozicioj de la Internacia Lingvo en la mondo, plian unuecigon de la Esperanto-Movado, plian fortikigon de la aŭtoritato de UEA kiel reprezenta organizaĵo de la Esperanto-Movado, kaj eĉ plian riĉigon de la kultura enhavo de la Internacia Lingvo.

Trie, eĉ en la kazoj, kiam la internacia aparato de lingva imperiismo formale malsukcesigis iun proponon celantan solvi la lingvan demandon, ni tamen kapablis, kaj plue kapablos transformi negativan decidon en pozitivan avantaĝon por la Internacia Lingvo. Por povi proteste forlasi Konferencon pri Homaj Rajtoj pro malobservo de la lingva egaleco kiel unu el la bazaj principoj de UN kaj de la Universala Deklaracio⁶, oni unue devas havi la rajton esti reprezentita en tia Konferenco kaj la Konferenco mem devas fari tian absurde neallaseblan decidon. Cetere, ĝuste la forlaso kaŭzis multe pli da interesiĝo de la presagentejoj kaj de pluraj vere gravaj gazetoj, ol estus povinta elvoki la akcepto de nia racia propono. La fakto estas, ke nia energia protesto estigis pli da informoj, ol la tuta Konferenco kaj ĉiuj ĝiaj "laboroj" kune. Tute egale kion faras la protagonistoj de lingva diskriminacio, ni ĉiam scias eltiri utilon por la Internacia Lingvo.

Kvare, ĉiuj kampanjoj kaj iniciatoj havis kaj havas grandegan signifon ankaŭ el vidpunkto de nia informado. Finfine, oni ne povas hodiaŭ serioze kaj efike informadi per "paroladoj" en Hyde Park Corner en Londono, aŭ en similaj lokoj en aliaj landoj, sed unuavice ekspluatante taŭgajn okazojn, en konvenaj tempoj, per adekvataj rimedoj, tute konforme al la spirito de la Principaro de Frostavallen, precipe al la eroj VI/14, VII/16 kaj VIII/18⁷.

Kvine kaj laste la afero rilate la Proponon al UN ankoraŭ neniel estas finita. Ni interrompis la planitan pluan agadon en majo, 1967, pro la eksplicita peto de la iniciatintoj de la Skandinavia Propono al Unesko, ĉar, laŭ ilia opinio, kia ajn nia plua paŝo en tiu afero estus povinta malutili al la entreprenitaj klopodoj ĉe Unesko. Nun, kiam montriĝis, ke la Sekretariato de Unesko sukcesis unue prokrasti kaj poste entombigi la Proponon, same kiel ili sukcesis komplete akvumi la Proponon de Hindujo al la lasta Konferenco⁸, nenio plu ligas al ni la manojn. La publikigo, en unu el la sekvantaj numeroj de "La Monda Lingvo-Problemo", de la tuta dokumenta materialo kaj korespondado kun la Sekretariato de UN evidentigos la senprecedencan diskriminacian sintenon de la Sekretariato en tiu ĉi afero. Tio ne povos ne provoki profundan indignon pro tiu sinteno kaj samtempe apogon por nia pozicio en ĉiuj kulturaj medioj.

Kiel montrite, ĉiu el la realigoj prenita aparta havis rimarkindan valoron en unu aŭ alia senco, depende de la karaktero de la agado kaj de nia konkreta celo; prenitaj kune, ili prezentigas kiel potenca armilo por la Internacia Lingvo kaj samtempe envicigas nin en la unuan linion de la vasta, ĝenerala batalfronto de progreso.

Ivo Lapenna

(6) Detaloj en la novembra numero de "Esperanto", 1968, p. 158-9.

(7) Vidu la Principaron en la ĵus publikigita broŝuro "Statuto kaj Regularoj de UEA", 1968, p. 58-61.

(8) Vidu la revuon "Esperanto", novembro, 1968.

LASTMOMENTE

En ligo kun la supra artikolo ni informas, ke dum decembro okazis denove viglaj debatoj en la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj pri la demando de oficialaj kaj laboraj lingvoj. Pasintjare (vidu "Esperanto"-n de aprilo 1968, p. 52) temis pri la franca lingvo; ĉi-jare la luktoj centriĝis ĉirkaŭ la rusa. Laŭ ankoraŭ ne konfirmitaj raportoj la debatoj finiĝis per akcepto de la rusa lingvo kiel plia labora lingvo de UN kaj ĝiaj organoj. Detaloj sekvas.


ESPERANTO POR LA TURISMO

Kiel vi povas kunlabori

Lastatempe mi estis en la fama franca ban-urbo Vichy, pri kiu cetere ekzistas bona prospekto en Esperanto. En la hotelo oni donis al mi franclingvan broŝureton kun multaj informoj. En ĝi mi trovis ankaŭ tutan paĝon da "utilaj adresoj": apoteko, trovejo de perditaj objektoj, urba administracio, polica direkto, loka grupo de la Ruĝa Kruco kaj ankaŭ "Rotary Club" kaj "Lions Club". La "Esperantan grupon" mi vane serĉis, kvankam la urbo eldonis Esperantan prospekton. Tiun konstaton mi faris en pluraj lokoj. Estas do grava tasko de la loka grupo aŭ de la UEA-delegito (kaj speciale de la Faka Delegito por Turismo), kontakti kun la Turista Oficejo (de ĉiu urbo, ne nur de Vichy!), por ke *ankaŭ Esperanto* estu menciata. Per tiu simpla mencio oni donas al vojaĝantaj esperantistoj la bonan konsilon, ĉeesti la grupan kunvenon — kaj al la direktoro de la urba turismo oni montras, ke Esperanto vere vivas kaj servas kaj volas serioze kunlabori sur la turista tereno!

Serioze kunlabori. Jen postulo, kiun oni ofte miskomprenas. Se fremdultrafika (= turisma aŭ turista) oficejo eldonas Esperantan prospekton, ĝi ne faras tion pro pura idealismo. Turisma direktoro estas, unue, propagandisto kaj vendisto. Li ofertas la naturan belecon de pejzaĝo, la sanigan forton de varmo-fonto, la historiajn vidindaĵojn de urbo, la romantikajn impresojn de mezepokaj stratoj, domoj kaj fortikaĵoj. Krome li rekomendas hotel-restadon, viziton de muzeoj, teatroj, restaĵoj, kafejoj kaj tiel plu. Lia idealismo, eldoni *Esperantan prospekton*, baziĝas sur la espero, altiri al sia urbo aŭ regiono novajn, pliajn turistojn — per la praktika uzado de la Internacia Lingvo komprenata de internacia publiko. Sekve: oni skribu al tiuj oficejoj por peti la prospektojn! Skribu kiel vojaĝanto, kiel *turisto*, se vi intencas viziti la koncernan landon aŭ urbon kaj tial deziras informiĝi. Fanatikuloj kaj kolektantoj estas urĝe petataj: NE skribu. Ili faras malbonan impreson kaj sendube malutilas al la bona afero.

La Oficejoj de Turismo ĝenerale ne havas oficiston, kiu korespondas en Esperanto, eĉ ne la oficejoj, kiuj jam "uzas" la Internacian Lingvon por eldono de prospekto. Tial estas tre utile, ke la loka grupo aŭ la UEA-delegito persone aŭ perletere *kontaktu kun la Turista Oficejo* por diri al ĝi: ke la loka grupo aŭ la delegito ĉiam volonte estas preta, senpage servi kiel tradukanto. Oni aldonu al la letero aŭ transdonu persone konvenan informilon aŭ broŝureton. Tia kontakto povos iam esti la *startpunkto* por komuna agado, por amika kunlaborado. Ne forgesu, sendi al la Turista Oficejo inviton por informaj vesperoj (parolado, ekspozicio) kaj atentigi ĝin pri la ko-



La moderna turisto rigardas la mondon ĉefe tra la objektivo de sia fotilo.

menco de Esperanta kurso. Eble la direktoro instigos oficiston, partopreni tian kurson. La celo de nia tuta informado ja ne estas, daŭre servi kiel "interhelpanto" aŭ "tradukanto". Ni devas atingi, ke en ĉiu Turista Oficejo estu *almenaŭ unu persono*, kiu kapablas korespondi en Esperanto kaj kiu — se li ne ŝatas aliĝi al la grupo — abonu Esperantan revuon kaj aĉetu Esperantajn librojn, por ne forgesi la lernitan lingvon.

h. j. u.

TURISMAJ BROŝUROJ PRI FINNLANDO

"Amika Finnlando" eldonita de FINNLANDA TURISMA ASOCIO. Belaj multkoloraj bildoj. Mapo de Finnlando. Sciindaj praktikaj konsiloj por turistoj. Iom pli detalaj informoj pri la lando sub la titoloj: "Helsinki kaj suda Finnlando", "Lagolando", "Kuusamo kaj Laponio". **Distribuas:** Suomen Matkailuliitto, Helsinki.

"Rigardu Finnlandon" eldonita de MINISTREJO DE EKSTERLANDAJ AFEROJ. Poŝformata 32-paĝa libreto kun plasta kovrilo. Nigra-blankaj kaj multkoloraj fotoj. Generalaj informoj pri Finnlando sub titoloj: LA POPOLO, REGADO KAJ ADMINISTRADO, EDUKADO, KULTURA VIVO, SPORTO ktp. ktp. **Distribuas:** Ulkoasiain ministeriö, Helsinki.

"Helsinki, filino de Balta maro" eldonita de TURISMA OFICEJO DE HELSINKI. Multkoloraj bildoj. Stratmapo pri la centro de Helsinki, ankaŭ la situo de OTANIEMI, kie kuŝas la kongresejo, estas videbla en la mapo. **Distribuas:** Kaupungin matkailutoimisto, Pohjoinen Esplanadikatu 17, Helsinki.

"Turku, Finnlando" eldonita de TURISMA OFICEJO DE TURKU. Kvarkolora eta faldfolio kun ĝeneralaj informoj pri la urbo. **Distribuas:** Kaupungin matkailutoimisto, Linnankatu 8, Turku.

"Aboa vetus & nova" eldonita de LOKAJ EKLEZIOJ EN TURKU. Kvarpaĝa faldfolio pri la Katedralo de Turku. **Distribuas:** Seurakuntien tiedotustoimisto, Turku.

"Kongresa afiŝo". Distribuas: Kaupungin matkailutoimisto, Helsinki.

NOVA INICIATO PRI ALFABETOJ

Lanĉita el São Paulo

Laŭ iniciato de la ĝenerala konsulo de Libano en São Paulo, Brazilo, la urbo Biblos en Libano dissendis alvokon pri okazigo de monda kongreso en tiu urbo por konsideri la unuecigon de la skribsistemoj de la mondo. La propono jam ricevis apogon de pluraj gravaj organizaĵoj kaj unuopaj eminentuloj.

Nur antaŭ du monatoj ni raportis en "Esperanto" (novembro, p. 157, 160) pri propono de Hindujo al la Ĝenerala Konferenco de Unesko, rilate la eltrovon de komuna skribsistemo por ĉiuj popoloj. Preskaŭ samtempe kun tiu propono kaj, ŝajne, sendepende, la ĝenerala konsulo libana en São Paulo, d-ro Joseph Naffah, lanĉis sian projekton pri monda kongreso en Biblos (Jbeil), urbo rigardata kiel naskiĝloko de la alfabeto skribado. Transprenis ĝin tuj la Kultura Unuiĝo Brazilo-Libano, la Urbodomo de Biblos en Libano kaj la grava institucio Brazilo Societo por la Progreso de la Scienco. Post nelonge aldonis sian apogon ankaŭ la Konsilo de Rektoroj de Brazilaj Universitatoj, la Societo de Uzantoj de Elektronaj Kalkuliloj kaj la Inĝeniera Instituto de São Paulo.

Konstanta centro establota?

Laŭ la koncepto de d-ro Naffah, la kongreso en Biblos diskutus ne nur pri komuna alfabeto sed ankaŭ pri internacia unuecigo de konvenciaj simboloj kaj matematikaj signoj. Sian projekton li lanĉis ĝuste en la jaro de la 500-a datreveno de la morto de Gutenberg, eltrovinto de la presarto en Eŭropo. La kongreson sek-

vus, laŭ la projekto, la kreo de konstanta centro kaj biblioteko pri skribsistemoj en la urbo Biblos.

Ankaŭ la guberniestro de la Stato de São Paulo (la plej prospera regiono de Brazilo), d-ro Roberto de Abreu Sodré, esprimis fortan apogon al la ideo.

Intertempe la iniciatinto, konsulo d-ro Naffah, vizitis la Esperanto-Asocion de São Paulo kaj diskutis tie la eventualan rolon de Esperanto en la movado por skrib-unuigo. En tiu kunligo oni memoras, ke la vic-prezidanto de la Komitato por Reformo de la Ĉina Skriblingvo (Pekino), Je lajŝi, estas samtempe aktivulo de la ĉina Esperanto-movado.

Aspekto de São Paulo, Brazilo.



Silezia Esperanto-teatro naskita

Nova grupo da geaktoroj aperis sur la scenejo de la Esperanta teatro. Ili estas kelkaj membroj de la Silezia Teatro en urbo Opava, Ĉeĥoslovakujo, kiuj grupiĝis por prepari Esperantan prezenton de la romantika versdramo "Manon Lescaut" de la ĉeĥa moderna poeto Vítězslav Nezval. Rimarkinde — je la komenco de la studado de la dramo, en aprilo 1968, ankoraŭ neniu el la aktoroj sciis eĉ unu vorton da Esperanto. Sub la gvido de Vlastimil Kočvara ili fine tiel mastris siajn rolojn, ke ĉies deklamo estis jam modela, kio kompreneble forte influis al ilia lernado de la lingvo.

La unua prezento okazis en la jugoslava urbo Pula la 21-an de julio 1968, antaŭ nur malgranda publiko plejparte nescianta Esperanton. Multe pli sukcesa estis la dua prezento — ĉi-foje antaŭ plene komprenanta publiko —

dum Trilanda Renkontiĝo Esperanta en Jabloniec nad Nisou, Ĉeĥoslovakujo, la 4-an de aŭgusto.

Dramo ĉarmis du generaciojn

Oni povas esperi, ke troviĝos pliaj okazoj por enscenigo de tiu teatraĵo en ses bildoj en la eminenta traduko de Jiří Kofínek — ofta premilo en la Belartaj Konkursoj de UEA. La dramo mem jam ĉarmis du generaciojn da admirantoj en la originalo, per siaj versoj plenaj de pasio kaj tenero. Des pli forte oni povas esperi, ke tiu nova teatra trupo Esperanta longe vivos por aldoni novajn sukcesojn al tiuj de Internacia Arta Teatro, Bulgara Esperanto-Teatro kaj la Teatro Populara de Łódź.



Foto:
Soňa
Hodková

KIEL FRONTI INTERVJUISTON:

Adaptita de la aŭtoro laŭ artikolo "How to Face a Media Man", The British Esperantist n-ro 747 (aŭg/sep 1968) p. 409-410.

Ciu parolanto de Esperanto kaj subtenanto de la ideo de la Internacia Lingvo devus ne forgesi la eblecon, ke li ricevos inviton esti intervjuata por la radio, la televido, aŭ la gazetaro. Povas esti, ke la intervjuo okazos subite, preskaŭ sen antaŭaverto. Tial oni preparu sin por tia eventualo. Jen kelkaj atentindaj punktoj.


1. *Sciu la faktojn!* Studu informdokumentojn: flugfoliojn kaj informlibretojn de via landa aŭ regiona asocio, dokumentojn de CED (ekzemple *Bazaj Faktoj pri la Internacia Lingvo Esperanto*) kaj librojn kiel *Retoriko* kaj *Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj* de Lapenna. Ĉerpu aktualaĵojn el la revuo *Esperanto* kaj el via landa Esperanto-organo, eventuale ankaŭ el aliaj gazetoj.

2. *Ne defensivu!* Tute verŝajne estas, ke la intervjuisto kontraŭstaros vian opinion, faros riproĉojn kontraŭ viaj asertoj, kaj provos refuti viajn argumentojn. Tio estas nur lia devo; via devo estas rebati per egalaj frapoj. Esperanto estas ja bona ideo, ja bezonata en la hodiaŭa mondo — ne timu aserti tion, eĉ tre forte! En radia aŭ televida diskuto, oni probable invitos vin partie pledi por la Internacia Lingvo, prefere ol senpartie pesi la argumentojn por kaj kontraŭ ĝi. Do koncentru viajn fortojn al pledado por Esperanto; lasu al aliaj fari kontraŭargumentojn.

3. *Estu realisma! Evitu fanatikismon kaj ekstremismon!* Ne faru ekstravagancajn troigojn, nek faru falsajn pretendojn pri la disvastigo de Esperanto. (Sed tuj rifuzu falsajn pretendojn pri la disvastigo de la angla aŭ alia nacia lingvo!) Al la demando, kiom da homoj parolas Esperanton, respondu: "oni ne scias precize, sed proksimume unu miliono". Al la demando, kiom da tempo oni bezonas por lerni la lingvon, respondu: "nur parteton de la tempo bezonata por lerni nacian lingvon", kaj klarigu la kialojn. Ne menciigu precizan tempodaŭron, ĉar ĝi povas variigi inter tri semajnoj kaj tri jaroj, depende de la kapablo kaj inklino de la lernanto.

4. *Tenu vin ĉe la ĉefafero!* Ekzemple, se oni demandas pri la diverseco de prononcado, diru, ke la prononcado de Esperanto estas relative ja unueca — sed ne forgesu menciigi, ke la vera elekto kuŝas inter Esperanto kaj iu alia solvo de la lingva problemo. Se la angla lingvo estus ĝenerale adoptita, la problemoj de prononcado estus multe pli akraj.

5. *Estu ĝisdata!* Menciigu eventon aktuale interesan, kiu povas esti kroĉita al Esperanto aŭ al la bezono de komuna lingvo — eventuale okazajon, kie la lingvobaro kaŭzis ĝenon aŭ eĉ katastrofon. Tiajn aferojn oni ĉiusemajne raportas en la ĵurnaloj.



KONSILOJ

6. *Ne malfortigu viajn argumentojn* — trude diskutadon pri Volapük, Ido, Interlingua aŭ aliaj projektoj. Tiel vi nebuligus la diskuton kaj konfuzus la publikon. (Sed havu pretan respondon, se la intervjuisto levos tiun punkton — eventuale preparu vin per studado de *Planlingvaj Problemoj* de Gilbert.)

— menciante demandojn, pri kiuj estas aŭ estis malkonsento aŭ hezito inter la esperantistoj, ekzemple *-ujo/io* aŭ *-ata/-ita*.

— uzante malfavorigajn epitetojn pri Esperanto, kiel "artefarita" aŭ "helpa". La hodiaŭa Esperanto tute ne estas la artefarita kreaĵo de unu homo, kaj Esperanto devos esti helpa inter nacioj nur laŭ tiu senco, laŭ kiu la naciaj lingvoj estas helpaj interne de la nacioj. Pri tiuj kaj aliaj punktoj studu *Principaron de Frostavallen* (UEA-Jarlibro 1965/I, p. 38) kaj, se vi legas angle, *Hints for Speakers* de Butler.

7. *Parolu koncize kaj klare!* Ne elverŝu frazojn ĝistede; ne baraktu en konfuzo. Memoru, ke la ŝlosila argumento por Esperanto estas tio, ke ekzistas tutmonda lingvo-problemo ne solvebla kontentige per alia rimedo, ĉar nur Esperanto estas samtempe facile lernebla kaj neŭtrala por ĉiuj; tiun solvon apogas argumentoj praktikaj, kulturaj kaj idealismaj.

J. C. Wells

OKCIDENTAJ DELEGITOJ KONSTERNITAJ

Lingva malavantaĝo

La Sepa Monda Konferenco pri Forto-produktado okazis en Moskvo antaŭ kelkaj monatoj. Laŭ raporto en "Gas Journal", brita revuo de la gasindustrio (vol. 335, 1968, p. 299-300), la delegitojn el okcident-eŭropaj landoj kaj Usono konsternis la fakto, ke ili troviĝis pro lingvaj kaŭzoj en malavantaĝa pozicio dum la konferenco. Jen kiel resumis la situacion la raportinto de "Gas Journal":

Kion ili NE povis legi

Ne gravis tiom la nombro de delegitoj rusaj, kiom la lingvaj malfacilaĵoj — delegitoj el okcidentaj landoj ne kapablis legi la raportojn kontribuitajn de la rusoj, sed la rusoj ja kapablis legi verkojn el la okcidento. ... La konferencaj lingvoj estis la angla, franca kaj rusa, kaj oni rajtis verki raporton en kiu ajn el tiuj tri lingvoj. Al ĉiu raporto estis aldonita tre konciza (kutime nur duonpaĝa) resumo. Tio ĝuste incitis nin, ĉar ĝi ebligis kompreni, kiom da valoraj informoj ni NE povis legi.



Ankaŭ dum la kunvenoj la rusoj havis avantaĝon. ... Kompreneble okazis samtempa interpretado. En la plenkunsidoj en la Palaco de Kongresoj ĝi estis bonega; en la fakaj kunsidoj en la universitato ĝi estis mezkvalita, foje eĉ malbona.

Interpretistoj kompatindaj

Tio havis du kaŭzojn. La miniaturaj aŭskultiloj disdonitaj al delegitoj estis ofte aŭ malbonkvalitaj aŭ misfunkciemaj. Due, la tre speciala teknika lingvaĵo de multaj raportoj tute venkis la kompatindajn interpretistojn — precipe tiam, kiam la tempo-limigo de ses minutoj devigis la parolanton voĉlegi sian raporton kun ekspresa rapideco.

Jen ankoraŭfoja atesto, ke la klopodo solvi la lingvan problemon en internaciaj konferencoj per teknikaj helpiloj estas nura iluzio.



TURKU - urbo de la Oficiala Postkongreso

En la antikva urbo Turku okazos de la 2-a ĝis la 6-a de aŭgusto 1969 la Oficiala Postkongreso de la Universala Kongreso en Helsinki. En tiu ĉi invita artikolo s-ro Jorma Ahomäki sciigas kelkajn bazajn geografiajn kaj historiajn faktojn, prezentas la agadon de la loka Esperanto-movado kaj skizas la planojn por la postkongresaj aranĝoj.

Turku estas la plej malnova urbo de Finnlando. Oni kutime diras, ke ĝi neniam oficiale estis fondita. Ĝi nome iom post iom kreskis el antaŭhistoria komercloko ĉe la buŝo de la rivero Aŭra. En la jaro 1280 oni komencis konstrui la Katedralon, kiu, poste pligrandigita, ankoraŭ nun estas uzata kaj samtempe estas valora historia memoraĵo. De la mezepoko ĝis la jaro 1812 Turku estis la ĉefurbo de Finnlando. La nombro de ĝiaj loĝantoj nune estas ĉ. 150 000.

Vigla centro de kulturo

La nuntempa Turku estas vigla centro de kulturo, industrio kaj komerco. En la urbo ekzistas du universitatoj, finna kaj sveda. Konstantaj teatroj estas du, finnlingva kaj svedlingva aganta en malnova teatra domo, kiu devenas el la antaŭa duono de la pasinta jarcento. En pluraj industriaj fakoj Turku havas malnovajn tradiciojn. Unu el la plej rimarkindaj estas la ŝipkonstrua industrio, kies produktojn oni liveras ĉefe al eksterlandaj klientoj, okcidenten kaj orienten. Abunde reprezentataj estas ankaŭ teksaĵ- kaj metal-industrioj same kiel nutraĵfarejoj. Turku estas

Tra la koro de Turku, urbo de la Oficiala Postkongreso 1969, fluas la rivero Aŭra, kies bordoj somere estas ravaj promenejoj.

(Fotoj: L. Kantonen)



Turku situas nur ĉ. 150 kilometrojn for de Helsinki kaj 275 km. de Stockholm trans la maro.

unu el la plej grandaj havenaj urboj en Finnlando, kaj kiel turista haveno ĝi estas la unua. De Turku estis jam dum pli ol 70 jaroj regula turista ŝiptrafiko al Svedlando. Tra la haveno vojaĝas jare ĉ. 700 000 pasaĝeroj, pro kio oni rajtas diri, ke Turku estas Finnlanda pordego okcidenten.

El la vidindaĵoj de Turku ni menciuj ankaŭ la unikan metiistan muzeon, kiu interesas plejparte eksterlandanojn. Ĝi situas en malnova kvartalo konsistanta el lignaj domoj, kiuj saviĝis el la granda incendio de 1827 kaj kiuj devenas el antaŭa jarcento. Kvardeko da diversfakaj metiistaj laborejoj, vendejoj k.a. kun siaj malnovaj laboriloj troviĝas en originala ĉirkaŭaĵo.

Celkonscia loka movado


En Turku funkcias unu el la plej grandaj Esperanto-societoj de la tuta lando kun proksimume 100 membroj, kiuj vigle partoprenas en diversaj klubaj aranĝoj. Tri el la lokaj klubanoj apartenas ankaŭ al la Loka Kongresa Komitato de la 54-a Universala Kongreso: s-ino Irja Klemola, vicprezidanto; s-ro Harri Melasniemi, informado, kaj s-ro Jorma Ahomäki, ekskursista servo. Somere en 1969 oni aranĝos

La ĉefa navo de la Katedralo de Turku ĉe la rivero Aŭra. En la fono oni vidas la orgenbalkonon. Koncerto ĉe tiu organo estos la kulmino de unu el la ekskursoj dum la Postkongreso 1969, kiu havos karakteron unuavice kulture-turisman.

jam la kvinan fojon Esperanto-kurson en la Somera Universitato de Turku; ankaŭ ĉi tiun aferon iniciatis la loka societo. La unuan kurson gvidis s-ro F. Jáki el Budapeŝto, poste dufoje instruis s-ro Jorma Ahomäki el Turku kaj somere en 1968 s-ro Andrzej Pettyn el Varsovio. Kluba bulteno "Informilo" aperas dumonate. Aŭtune en 1968 funkciis entute kvin diversgradaj kursoj. UEA havas 14 delegitojn en Turku. Nia membro prof. Y. Väisälä apartenas al la Honora Patrona Komitato de UEA. La Urba Turisma Oficejo pretigis broŝuron pri la urbo en Esperanto, kaj same faris pri la Katedralo la administron de lokaj eklezioj. La Urba Biblioteko havas kontentige grandan stokon da Esperanta literaturo, kiu estas vigle pruntata kaj utiligata. La gazetaro en la urbo jam nun favore rilatas al nia movado, kiu sukcese zorgis pri siaj rilatoj informaj tiudirekte. Verŝajne tiuj ĉi mallongaj mencioj sufiĉas por montri, ke Esperanto-societo en Turku agas celkonscie kaj kun rezultoj.

Postkongresaj planoj

La Postkongreso daŭras 5 tagojn. La plej bonaj ĉambroj en la Somera Hotelo en la Studenta Domo jam estas rezervitaj por la kongresanoj. El la vidpunkto de la aranĝantoj



Turku - urbo de la Postkongreso

la Studenta Domo estas tre praktika, ĉar tie ĉio povas okazi sub unu sama tegmento: tranoktado, manĝado kaj diversaj distraj aranĝoj. La programo de la Universala Kongreso estas ĉiam laborplena kaj tial nature iom laciga, tial la Postkongreson en Turku karakterizas refreŝiga turismo, trankvileco kaj amika atmosfero. La urbo mem donas multajn interesajn celojn por mallongaj ekskursoj. Krome oni preparas ekskurson per modernaj akvobusoj al la najbara urbeto Naantali, kie nia prezidanto Urho Kekkonen pasigas siajn somerojn. Ni ne forgesis balon nek specialan saŭnovesperon, al kiu donas vere modelajn kadrojn nova, moderna motelo iom ekster Turku. Iu el la ekskursoj farotaj al urbaj vidindaĵoj finiĝos per orgenkoncerteto de Pauli Riihivaara en la Katedralo de Turku. Unu vespero de la postkongresanoj estas rezervita por vizito en hejmoj de lokaj esperantistoj.


Fine: bonvenon !

Detala plano kaj horaro por la postkongresaj aranĝoj baldaŭ estos pretaj. Sed estu jam nun certaj pri tio, ke turkuanoj faros ĉion eblan por sukcesigi vian viziton. Bonvenon, koran bonvenon al Turku.

Same revu en la saŭno povos ankaŭ vi - postkutimiĝo al la temperaturo! Speciala saŭnovespero en moderna motelo estos unu el la allogaĵoj de la postkongresaj tagoj en Turku.



ALVOKO AL UNU- OPAJ ESPER- ANTISTOJ



Amikeco trans limoj

La 16-22-an de februaro ni festos Semajnon de Internacia Amikeco. Ĉiu unuopa esperantisto, ĉiu klubo, ĉiu landa asocio kunhelpu, por ke tiu Semajno iom post iom fariĝu granda kultura evento, kiu faros Esperanton kaj ĝian ideon konataj al ĉiuj. Ĝi ankaŭ kreos al ni esperantistoj valoran kuntenilon en la formo de unika tradicio.

Uzu la amiko-kartojn

Antaŭ la Semajno, faru liston pri viaj amikoj, esperantistaj kaj neesperantistaj, al kiuj vi volas sendi saluton. Tuj antaŭ aŭ dum la Semajno sendu al ili amikan saluton. Prefere uzu la amikokartojn (ili estos haveblaj de la libroservo de UEA kaj ordinare de la Esperantaj eldonejoj). Unu el ili estas en pluraj lingvoj, alia havas nur la emblemon kaj la tekston "Semajno de Internacia Amikeco". Ambaŭ estas uzeblaj ankaŭ al neesperantistoj. Uzu ankaŭ la specialajn donacajn amikokartojn (po 5,— gld.) kun la emblemo de la Semajno.

Partoprenu la festan kunvenon de via Esperanta klubo la 15-an de februaro.

Se vi havos eblojn, sendu ankaŭ donacetojn al viaj amikoj dum la Semajno.

Por Semajno de Internacia Amikeco:

Erik Carlén,
Hällabrottet, Svedujo

Aperis en eldono de UEA nova

FOTO-POSTKARTO

kun portreto de la iniciatinto de Esperanto

D-RO L. L. ZAMENHOF

La portreto estas fotografiaĵo lastatempe retrovita kaj, ŝajne, antaŭe nekonata. Konvena kiel salutkartoj.

Formato: 90 × 140 mm. Prezo: po 0,30 gld. (1,2 steloj), plus afranko 10%. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.

KONGRESOJ JAM NUR RUTINAJ?

Skribas Isaj Dratwer (Israelo):

Universala Kongreso de Esperanto estas sendube por ĉiu partoprenanto granda travivaĵo. Tamen kun bedaŭro oni devas konstati, ke la lastaj UK perdis sian brilon kaj fariĝis simplaj rutinaĵoj kun kelkaj fiksitaj, kutimaj programeroj. Estu do permesate al mi sur la kanvaso de la lasta UK en Madrido brodi kelkajn rimarkojn.

Eraroj gramatikaj

Bone estas, ke la Kongresa Libro aperis antaŭ la Kongreso kaj ĝustatempe estis sendita al la kongresanoj. Tamen ĝi enhavas gramatikajn erarojn, kiel ekzemple: "Komencos (komenciĝos!) kursoj en lernejoj", "Monatoj (?) poste komencas la Dua Mondmilito" k.s. Finfine oni ja rajtas postuli, ke en la oficialaj kongresaj eldonaĵoj estu korekta Esperanta lingvo.

Mankis hispana folkloro

Neniam en la historio de la Kongresoj la sama programero estis ripetita trifoje! Sed kial pensi, konsideri, zorgi pri la kongresa programo, peni ĝin variigi, sufiĉas ja nur ŝtopi la truojn... kaj la rutino estas kontenta! Dum la Kongreso eĉ ne okazis prezento de la riĉa hispana folkloro, kaj en la Somera Universitato mankis ia ajn prelego pri la hispana popolo kaj kulturo.

Manifestacio estu impona!

Laŭ la Kongresa Regularo "la Universala Kongreso estas internacia manifestacio de la Esperantistaro". Oni do nepre zorgu, ke ĝi vere estu brila, impona, interne kaj ekstere, manifestacio de la tutmonda esperantistaro!

Efika varbado

Skribas J. L. Muller (Nederlando):

Estinte la lastajn 20 jarojn ne aktiva esperantisto, kvankam ĉiam apoganta la movadon, mi estis kaptita de la paragrafo "agi tuj kaj ĝisfunde" el la "Fundamentaj Tezoj" de prof. Lapenna, kaj mi decidis ree aktiviĝi. Mi sukcesis varbi 4 gejunulojn, kiujn mi instruos pri Esperanto, ĉar mia opinio la estonteco de Esperanto dependas grandparte de la junularo. Plue mi konvinkis la entreprenon, en kiu mi laboras, pri la praktika valoro de Esperanto kaj akiris de ĝi donacon de 1000 guldenoj por Kapitalo Hodler 68 kaj du tutpaĝajn anoncojn por la Jarlibro.

En 1969 ni ĉiuj streĉu la fortojn por varbi lernantojn kaj monon. La fina venko dependas de ni mem!



S-ro J. L. Muller en la oficejo

La unua albana Libro Esperanta

Skribas Ota Ginz (Israelo):

Se la 48-paĝa broŝuro "Gjergj Kastrioti Skanderbeg", pri kiu informis la junia kaj decembra "Esperanto", aperis en 1968, tiam oni korektu la informon per indiko, ke jam en 1929 aperis en Albanujo Esperanto-libreto pri la sama temo, ĉe Shtypshkroja Komtara en Shkodre. Ĝi estas: "Skanderbeg, Heroo de Albanujo. Kompilita de Cuk Simoni" kun antaŭparolo de ĉeĥa esperantisto prof. Miloš Lukáš, 144 p., 21,5 x 14,5 cm. Tiun ĉi verkon kaj la albanan Esperanto-ŝlosilon el 1928 citas la Bibliografio de Stojan kaj la Enciklopedio de Esperanto. La Ŝlosilo estis presita en Italujo.

Rozinsula filatelo

Skribas Andreo Garret (Francujo):

Leginte la artikolon pri la Insulo de la Rozoj, mi petas informon, kie aŭ ĉe kiu mi povus akiri la poŝtmarkojn emisiitajn de tiu ĉi nova kaj efemera ŝtato.

Respondas la redaktoro:

La filatelistoj povas sin turni al Societo Filatela Internacia Centrala, Via Beccari 2/A, I-40136 Bologna, Italujo.

Mortis Upton Sinclair

NEKROLOGOJ

SIDNEY PEARSON HILL (1900-1968)

La 28-an de septembro mortis Sir Sidney Hill, urbestro de Nottingham, Britujo, dum 1962-63 kaj malnova membro de UEA.

GEORGE E. COLLIS

Mortis en Leicester, Britujo, la 12-an de aŭgusto 1968, George E. Collis, tre malnova membro kaj VD de UEA kaj aktivulo de la brita movado.

UPTON SINCLAIR (1878-1968)

La 25-an de novembro mortis en New Jersey, Usono, la monde konata verkisto Upton Sinclair, el kies pli ol 80 libroj aperis en Esperanto "Jimmie Higgins" (1934) kaj "Petrolo" (2 vol., 1936). Li dum la tuta kariero strebis por socia plibonigo kaj forte apogis la Internacian Lingvon. Laste li subskribis la Proponon al UN en 1966.

AKADEMIO AGEMA KAJ STUDINDA

Recenzas Alec Venture (Britujo):

Aktoj de la Akademio, 1963-1967. Rotterdam: La Akademio, (1968). 75 p. 23 cm. (Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto, No. 9).

La unua parto prezentas koncizan historion pri la Lingvaj Institucioj, la Statuton de la Akademio kaj liston de la membroj. La lingva parto estas dividita en tri sekciojn, kiuj pritraktas la pasivajn participojn kaj la vortfaran teorion, kaj donas la tekstojn de la *Komunkaĵoj* senditaj de la Akademio al la gazetaro.

Jen tre interesa studmaterialo pri la rolo de la iama Lingva Komitato kaj la nuna Akademio. Oni povas konstati, ekzemple, ke dum la pli longa parto de la ekzisto de tiuj institucioj ilin prezidis francoj, sed ke la proporcio de francoj inter la membraro multe malpli grandigis; ili nun nombras nur 3 el 45. Sed la influo devenas, ne de nura nombro, sed de la gravaj oficoj; la francaj membroj estas ja la prezidanto (Waringhien), la sekretario-kasisto (Bernard) kaj la direktoro de la sekcio

pri la ĝenerala vortaro (Albault). Certe la Akademio estas nun pli agema ol iam ajn antaŭe.

Pli ol duono de la paĝoj dediĉitaj al la lingvo rilatas al la demando *-ata/-ita*. Ĉar jam aperis tiel multaj presaĵoj kaj artikoloj pri tiu temo, mi ne volas ĉi tie plue komenti tiun aferon.

Por fine akceptigi la vortaran teorion unue ellaboritan de René de Saussure kaj eldonitan jam en la jaroj 1910-1915 devis forpasi pli ol duono de jarcento! Kiel oni scias, en la tri-dekaj jaroj Kalocsay plue evoluigis la teorion; kaj li helpis reverki la unuan tekston de la sekcio pri la ĝenerala vortaro. La *Rekomendoj de la Akademio* pri la principoj de la vortfarado utile resumas la sistemon aprobitan.

Sur la 11-a linio de la 27-a paĝo staras *ĝia* anstataŭ *sia*; sur la 2-a linio de la 38-a paĝo la uzo de la participo (*klariginte*) estas kontraŭregula.

Mendu ĉe UEA: 5,— gld. plus sendokostoj 10%.

INFORMOJ DE CED

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO PRI LA MONDA LINGVO-PROBLEMO

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo. Telefono (01) 904 9081.

Katedroj kaj lektoratoj de Esperanto

Meze de novembro, 1968, CED entreprenis novan enketon pri la katedroj, lektoratoj aŭ aliaj gradoj de la Internacia Lingvo en universitatoj aŭ samrangaj altlernejoj aŭ institucioj.

La demandaro estis sendita al kvindek da universitatoj aŭ samrangaj institucioj, en kiuj Esperanto estas enkondukita, laŭ la informoj pri kiuj disponas CED. CED petis la instruantojn de la Internacia Lingvo respondi al la demandaro kaj resendi ĝin kiel eble plej baldaŭ al la adreso de la *Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo*, 77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Britujo.

Se iu instruanto de Esperanto en universitato aŭ samranga altlernejo ne ricevis la demandaron, li bonvolu ĝin tuj peti de CED je la menciita adreso.

La enketo nepre devas esti finita en aprilo, tiel ke CED povu eldoni ĝisdatan dokumenton en majo kaj publikigi la rezultojn en "Esperanto".

CED aparte atentigas, ke tre verŝajne ĉiuj

instruantoj en universitatoj jam ricevis aŭ ricevos ankaŭ alian demandaron de CED pri la instruado de Esperanto en la lernejoj ĝenerale, inkluzive universitatojn, sed tiu alia enketo havas tute alian celon. Do, necesas aparte respondi al la enketo pri universitatoj, kaj tute aparte al tiu pri la lernejoj, kiun faras s-ro Helmut Sonnabend en la nomo de CED.

La rezultoj de ambaŭ enketoj aperos en formo de du dokumentoj de CED, kiuj, interalie, servos kiel bazaj dokumentoj por la planita Lerneja Konferenco pri Interŝtata Konvencio por enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

Donacoj por CED

	£	ŝ	p
La stato je la 30-a de junio	144-	2-	2
S-ro E. F. Dean, Britujo	24-	0-	0
S-ro E. F. Dean, Britujo	16-	0-	0
S-ro R. Markarian, Britujo	10-	0	
F-ino W. Steffering, Nederlando . .	14-	0	
S-ro Bogdan A. Jerković, Irano . .	4-	3-	8
S-ro E. Burg, Nederlando	11-	7	
S-ro A. Santos, Karaĉi	6-	1	
S-ro E. Burg, Nederlando	5-	9	
S-ro W. Gieseler, Germanujo	23-	5-	1
S-ro E. Burg, Nederlando	5-	9	
S-ro Salvador Olivan, Hispanujo . .	11-	11	
S-ro H. Künzel, Germanujo	1-	3-	3
S-ro E. Burg, Nederlando	5-	9	
D-ro A. Albault, Francujo	12-	9	
La stato je la 30-a de okt. 1968 . . .	216-	16-	11

Al ĉiuj donacintoj CED esprimas tutkoran dankon. Donacojn por CED akceptas la C.O. de UEA, ĉiuj ĉefdelegitoj aŭ perantoj, la Oficejo de CED je la nomo de ĝia direktoro.

TURISTI EN HUNGARUJO

Recenzas Hj. Unger (Svisujo):

Esperanta-hungara/hungara-Esperanta turista vortaro, de Alfonso Pechan. Budapest: Terra, 1968. 256, 288, 32 p. 13 cm. Bd.

La titolo estas iom erariga: ne estas esence turista vortaro, sed ĝenerala vortaro kun multaj esprimoj pri gastronomio, trafiko kaj turismo. Entute: praktika kaj utila libro. La manuskripton tralegis prof. Kálmán Kalocsay, membro de la Akademio de Esperanto.

Dudekpaĝa suplemento resumas por la hungaraj legantoj la gramatikon de la Internacia Lingvo kaj klarigas geografiajn nomojn.

Vere interesa estas la aldonita listo (kvarpaĝa) pri "la deveno kaj klarigo de kelkaj novaj vortoj". Interalie mi notis: drinkbaro, espresso (por "kafejo, kie oni trinkas kafon maŝine kuiritan"; ne rekomendinda), lokalo (por "music-hall, boite de nuit", ne rekomendinda), motelo, partnero, pneo (por aŭtomobila pneŭmatiko), presio (gazetaro aŭ preso estas absolute preferindaj), saŭno, signaturo (anstataŭ subskribo), streta (por mallarĝa), taksi-fono (?), vikendo (por pli trafa: semajnfino).

Aŭtoro
Alfonso
Pechan



La plej potenca industrio

Turismo estas la plej potenca industrio de la hodiaŭa tempo. La speciala Esperanta terminaro estas do urĝe bezonata. Kompili ĝin estas la nova tasko de la "Internacia Akademio de la Turismo", kiu ĵus decidis, aldoni Esperantan tradukon al la internacia "Vortaro de la Turismo" de ĝi kompetente eldonata, unue al la tri vortaroj kun la gvidantaj lingvoj angla, franca kaj germana.

Mendu ĉe UEA: 6,— gld. plus sendokostoj 10%.

Surtera infero

Recenzas U. J. Moritz (Germanujo):

Viktimoj de la atombombo; Travivaĵoj de atomvunditoj en Hiroŝima. (Div. aŭtoroj). Tr. Jui ĉunoŝin. Tokio: Asake-Syoboo, 1968. 134 p. Ilus. 19 cm.

Tiu ĉi libro enhavas raportojn de naŭ personoj vivante en Hiroŝimo spertintaj la atombomban eksplodon la 6-an de aŭgusto 1945. Ĉiuj raportoj estas tiel vigle mortorealismaj, ke leganto nepre translokigas en tiun surteran inferon.

Jui ĉunoŝin, kiu bruligis sin la 11-an de novembro 1967 "protestante kontraŭ la japana kaj usona politiko" (p. 113), estis tradukinta tiujn naŭ raportojn el la originala japanlingva libro pli ol duobla-ampleksa.

Lingvaĵo iom obstakla

La lingvaĵo estas jen kaj jen iom obstakla, kion kaŭzis — laŭ noto de la redaktinto Hukuta-masao — precipe la klopodado adapti la Esperanto-tekston al la japana stilo. Mi tion opinias ĝusta-efika, ĉar la obstakloj en legado certgrade spegulas la situacion de la raportintoj en la ruinigita Hiroŝimo. Sed en pluraj lokoj la obstakloj estas fundamente gramatikaj

malĝustaj, ekz.: "Cetere ni tri, la tutaj familianoj estis savitaj" devus teksti "Krom ni tri ĉiuj familianoj...", kaj "...ni noktigis..." signifu "...ni tranoktis...". Unu vorto, kvankam supozeble germandevena, eĉ kuntekste ne estas komprenebla: "aŭfhebita" (p. 86).

Sume: libro leginda, sed eĉ pli legenda.

Mendu ĉe UEA: 5,60 gld. plus sendokostoj 10%.

Konvinki per trafaj argumentoj

Recenzas Rudolf Rakuša (Jugoslavio):

L'Esperanto dans l'enseignement, de Pol Denoel. Liège: Fondation "Maurice Jaumotte-Locquet", 1968. 24 p. 23 cm.

Por ke Esperanto eniru la lernejojn, oni bezonas per trafaj argumentoj konvinki la kompetentajn instancojn. Ĝis nun mankis libreto, kiun oni povus al ili enmanigi. Tia broŝuro nun ekzistas. La sekreto de la senpasie verkita traktato estas la "imago", kiun ĝi peras, pri la lerneja valoro de la Lingvo Internacia. Por la supra celo gravas faktoj, kaj en ĉi tiu broŝuro ĉiu aserto estas precize dokumentita en subnoto aŭ en la bibliografio. La interna kaj ekstera aspekto estas eleganta kaj alloga.

Mendu ĉe UEA: 4 steloj; sendokostoj 10%.

„Socia Liriko” uzbeka

Recenzas F. S. Wechsler (Rio de Janeiro):

Zejnab' kaj Aman', poemo de Ĥamid Alimĝan, tr. Petro Poliŝĉuk. Taŝkent: Komisiono de Esperantistoj de Uzbekistano, 1968. 30 p. 23 cm.

Kio donas forton al tiu poemo estas ne la historio (tre simpla kaj ordinara), sed la socia liriko (*). En ĝi la aŭtoro klopodis reliefigi la identecon de la marksismo-leninismo kun la popola kulturo.

La socialisma trajto evidentiĝas en la parto, kie la verkinto kritikas la malnovajn religion kaj morojn, kiel kontraŭsociajn, aŭ kiam li emfazas la valoron de kolĥozo, kiel socian kunligilon.

Flua traduko

La traduko estas ĝenerale flua, kaj sukcesas redoni la belajn tropojn de l' originala teksto. Kelke da versoj estas jen gramatike, jen poe- tike nekorektaj.

Bedaŭrinde la libro estas aĉe multobligita, kun multege da eraroj; tia verko meritis pli atentan zorgon de la eldonintoj.

(*) Socia liriko ne estas paradokso!

Mendu ĉe UEA: prezo ankoraŭ ne konata.

Maldekstre: Ĥamid Alimĝan



Progresas kurso reaperis

Recenzas Louis Beaucaire (Berlino):

Ellernu! Progresas kurso de Esperanto, de Ferenc Szilágyi. 2-a eld. Rio de Janeiro: Kul- tura Kooperativo de E-istoj, 1968. 121 p. Ilus. 24 cm.

Per sia konversacio-kurso d-ro Szilágyi kontribuis al la esperantistigo de almenaŭ du generacioj. Kaj multmeritaj estas la brazilaj aktivuloj, kiuj ebligis la reviziitan, nove ilustritan reeldonon de lia progresas kurso "Ellernu!" Ni bedaŭru, ke d-ro Szilágyi, mor- tinta antaŭ unu jaro, ne ĝisvivis la rezulton de tiu laboro.

La skemo de ĉiu leciono estas jena: 1. Gra- matiko 2. Konversacio 3. Literaturo 4. Legaĵo tradukota 5. Cerebgimnastiko 6. Grupludo 7. Kontrolo de la gramatikaj ekzercoj 8. Hejma tasko.

El la abunda materialo de tiu lernolibro, unuavice destinita al daŭrigaj kursoj, povos ankaŭ ĉerpi multaj E-grupoj, kiuj ofte ne scias, kiel okupiĝi dum siaj kunvenoj. Mi men- ciu precipe la ĉapitrojn "cerebgimnastiko" kaj "grupludo".

Sur la paĝo 68 forstrekenda paragrafo restis apud la plibonigita teksto. Kaj sur la paĝo 38 oni atribuis al la franca romanisto Mac Orlan, verŝajne pro la aspekto de lia pseŭdonimo, britan ŝtatanecon. Tiuj makuletoj estos facile ripareblaj en tria, espereble proksima eldono.

Mendu ĉe UEA: Prezo ankoraŭ ne konata.

LASTE APERIS...

Novaj Stafetaĵoj

Alvenis 3 novaj eldonaĵoj de Stafeto en la serio Beletraj Kajeroj: "Vivo de Gandhi", verkita de Edmond Privat (kun foto-ilustraĵoj, 7,20 gld.); la komedio de Shakespeare "Somer- meznokta sonĝo" en la nova traduko de Ka- locsay kaj originala poemaro de Hilda Dresen, "Norda naturo" (po 5,40 gld.). Ankoraŭ pli ampleksa (196-paĝa) estas la poemaro "Ritmoj de vivo" de Geraldo Mattos, ĵus eldonita en Rio de Janeiro kaj anoncita kiel n-ro 1 en nova serio "Libro-Klubo".

Statuto de UEA reaperis

Kiu serĉas fundamentajn informojn pri UEA, tiu de nun denove povas konsulti la Statuton kaj Regularojn de UEA, ĵus represitajn grand- akvante. Ĉiuj membroj individuaj ricevos en 1969 la novan 72-paĝan broŝuron, kiu enhavas l.a. la Statutojn de UEA kaj TEJO, la Duan Bazan Laborplanon kaj la Principaron de Frostavallen.

Nova lernilo por anglalingvanoj estas: "Es- peranto, a complete grammar" de Ivy Keller- man Reed. La ofsetita volumo tamen kostas

§ 5. Informi pri la lingva problemoj kaj ĝia solvo celas tri novaj eldonaĵoj: la japanlingva artikol-kolekto "Kio lin interesas, tio li estas" de Tacuo Hugiimoto (eld. L'omnibuso), la his- pana "Babel" de Emilio Crespo-Cano (4,50 gld.) kaj modern-impresa foto-broŝuro nederlanda de Hans Bakker patro, "Het groeiend taal- probleem".

Inter politikaj kaj religiaj broŝuroj ĉi- monataj meritas mencion nova represo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (UEA), tri pliaj tradukoj el verkoj de Maŭ zedong kaj kvakera informilo "Konsiloj kaj deman- doj".

Mendojn de novaj eldonaĵoj oni bv. adresi al la Libroservo de UEA. Ĉe novaj eldonaĵoj ne ĉiam eblas tuj indiki prezon en guldenoj. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10 % por sendokostoj.

KONDIĈOJ DE RECENZOJ

La revuo "Esperanto" principe recenzas ĉiujn duope ricevitajn novajn librojn, broŝurojn kaj diskojn. Unuope ricevitajn, kiel ankaŭ politikajn aŭ religiajn eldonaĵojn, ĝi nur men- cias. Nepetitaj recenzoj ne aperas.

LOKE - FAKE - PERSONE

LOKE

Azio

● Aktivuloj de la korea kaj japana movadoj renkontiĝis lastatempe en Tokio kaj rekunvenos en marto en Seulo. Planoj jam akceptitaj inkluzivas ĉiujarajn japan-koreajn seminarion, marbordan kunvenon kaj turistan kunvenon. Oni diskutas ankaŭ eblecojn de azia Esperanto-kongreso.

Britujo

● Dum la nokto de 29/30 novembro, kelkaj dekoj da anoj de la Societo por la Kimra Lingvo okupis la elsendejojn de BBC en du kimraj urboj, proteste kontraŭ la fakto, ke anglalingvaj elsendoj okupas pli da tempo, ol kimralingvaj.

Finnlando

● La 2-an de novembro okazis en Helsinko ĝenerala jarkunveno de EAF, kiun partoprenis ĉ. 200 personoj. La ĉefa solenaĵo estis transdono al reprezentanto de UEA (ĉefred. s-ro Lehtivaara) de altvalora surtabla standardo kiel omaĝa donaco al UEA de la Esperanto-kluboj de Heinola, Lahti kaj Vääksy.

Germanujo

● Trilanda renkontiĝo belgan-nederlandan-germanan en Düren la 29-an de septembro partoprenis ĉ. 100 personoj. Venontjare oni renkontiĝos en Heerlen, Nederlando.

Israelo

● Esperanto-Ligo en Israelo fondis landan Korespondan Servon, kiun gvidos s-ino Tova Levin, Tel Aviv, Sd. Emanuel 24. Ĝi krome decidis organizi internaciajn feriojn en "Verda Bordo" apud Natanja, 1-15 julio 69, kun posta 7-taga ekskurso tra Israelo.

Monako

● Monte-Carlo fariĝos kongresurbo por trilanda renkontiĝo franca-monaka-itala je 22-24 marto 1969 kaj por la kongreso de UFE en 1970. Informas la delegito de UEA.

FAKE

Aviado

● Oficiala raporto, ĵus eldonita, pri la falo de brita aviadilo en Francujo pasintjare nomis kiel unu el la kaŭzoj de la akcidento la lingvajn malfacilaĵojn kaj la mankon de normigita frazaro por komunikoj inter pilotoj kaj aerhavenoj.

Bibliografio

● La renoma Bibliografio de Internacia Lingvo (de Stojan, eld. UEA) baldaŭ reaperos ĉe germana eldonejo. La anoncita vendoprezos estos 68,— germanaj markoj, sed oni povas antaŭmendi (ĉe UEA) je prezo de 56 g.m. (50,40 gld.).

Esperantologio

● Plena konkordanco pri "La Gimnazio" (tr. Zamenhof) aperas en la nova "Literatura Kajero", monata presita revueto 8-paĝa. Adreso: Rua Baltasar Lisboa, 34 (ZC-11), Rio de Janeiro, Brazilo. Jarabono \$ 3.00.

Literaturo

● La premion Comella-Bassols de 1968 gajnis Giordà Moya-Escayola (Hispanujo). La duan premion atingis Tibor Sekelj.

● Komunana antologion por la "tirkaj" popoloj (turka, turkmena, uzbeka, kazaha, kirgiza, taĝika, karapalka, baŝkira, jakuta k.a.) kompilas d-ro Beier sándor, Cluj, Salcim 28, Rumanujo. Helpo estas bonvena.

Muziko

● En Wrocław fondiĝis klubo, kiu celas popularigi kanzonojn kaj informi pri muzikaj aferoj. La klubo posedas arĥivon de muzikaĵoj kun tekstoj en Esperanto, kiujn ĝi interŝanĝas. Adreso: Klub de Kazono "Belsono", Wrocław-17, Dubois 3, Polujo.

Teatro

● Scenon el la "Somermeznokta sonĝo" de Shakespeare en la majstra traduko de Kalocsay prezentis aktoroj de Ŝtata Pupteatro en Budapeŝto je la 77-jara datreveno de Kalocsay.

Tekniko

● S-ro R. Eichholz (2427 Padstow Crescent, Clarkson, Ont., Kanado), kiu preparas la Esperantan Bild-Vortaron de Duden, eldonis cirkuleron pri "Nova laborplano por ordigi la evoluon de nia teknika kaj scienca lingvo". Interesitoj petu ĝin ĉe la aŭtoro.

PERSONE

Prof. Popović, la nova prezidanto de JEL, fotita kun prof. Yrjö Väisälä (Finnlando), membro de la Honora Patrona Komitato de UEA.



Collinson

● La 4-an de januaro festas sian 80-jaran datrevenon membro de la Honora Patrona Komitato, prof. W. E. Collinson (Britujo), emerita profesoro de la Universitato de Liverpool kaj konata lingvisto kaj verkisto.


Popović

● Nov-elektita prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo estas prof. B. Popović, sekretario de ISAE.

Šupichová

● La 27-an de januaro fariĝas 85-jara f-ino Julie Šupichová, pioniro de la ĉeĥoslovaka Esperanto-movado, aŭtoro de multaj lernolibroj kaj aliaj verkoj, honora membro de UEA.

KVIN KARAVANOJ EN PREPARO



54-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Helsinki, 26 julio - 2 aŭgusto 1969

Alta Protektanto: D-ro Urho Kaleva Kekkonen, Prezidanto de Finnlando.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

Karavanoj

Informas pri karavanoj:

Britujo: BEA, 140 Holland Pk Ave., London W. 11.

Danujo: CDEL, Løvetandsvej 31, DK 2700 Brønshøj.

Francujo: UFE, 34 rue de Chabrol, F-75-Paris (10).

Italujo: IEF, S-ro G. Grattapaglia, Via O. Vigliani 15/10, I-10135 Torino.

Nederlando: LEEN, F-ino M. H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam.

Kotizoj

Ekde la 1-a de januaro 1969 validas jenaj:

- 1) Kongresano, ne individua membro de UEA, 77,— gld.
- 2) Kongresano, membro de UEA kun Jarlibro, 67,— gld.
- 3) Kongresano, membro de UEA kun Jarlibro kaj revuo "Esperanto" . 57,— gld.
- 4) Edz(in)o de Kongresano en kat. (1), 33,50 gld.
- 5) Edz(in)o de Kongresano kat. (2-3), 28,50 gld.
- 6) Junulo ĝis 20-jara 23,— gld.
- 7) Universitata studento ĝis 30-jara 38,50 gld.
- 8) Blindulo 31,— gld.

N.B.: Kongresano en kategorio (1) ricevas senpage dum la tuta kalendara jaro, en kiu okazas la Kongreso, la revuon "Esperanto".

Infana Kongreseto

Por la 11-a Internacia Infana Kongreseto, okazonta en la kadro de la 54-a UK, oni elektis la lernejon Aarnivalkea en la ĝardenurbo Tapiola, en ideala ĉirkaŭaĵo proksime de la Kongresejo mem. Aliĝkotizo: 50 gld. Aliĝiloj riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la Kongreso.

Ekskursoj

Por doni al la kongresanoj plian eblecon konatiĝi kun la diversaj aspektoj de la kongreslando, oni planas 5-tagan postkongresan ekskurson al Laponujo de la 7-a ĝis la 11-a de aŭgusto. La prezo de 580 gld. inkluzivas ĉion. Detaloj en la Dua Bulteno.

Dum la tuttaga ekskurso al Hämeenlinna kaj dum la Postkongreso en Turku plej verŝajne okazos folkloraj prezentoj. Korekte al pli frua informo, la prezo de la tuttaga ekskurso al Hämeenlinna estas 35 gld.

Statistiko (Je 9/12/1968)

Arg. 1, Aŭstral. 4, Aŭstr. 2, Belg. 6, Braz. 2, Brit. 27, Bulg. 13, Ĉeĥosl. 3, Danl. 7, Finnl. 83, Franc. 34, Germ. 21, Grek. 1, Hisp. 12, Hung. 8, Isr. 1, Ital. 8, Jap. 4, Jug. 11, Kan. 1, Ned. 33, Norv. 4, Nov-Zel. 1, Poll. 8, Port. 3, Sovet. 1, Sudano 1, Sved. 21, Svis. 4, UAR 2, Usono 12. Entute 339 el 31 landoj.


G. G. Pompilio

Konstanta Kongresa Sekretario

IFEF en Avignon

Avignon en Suda Francujo estas la kongresurbo por la 21-a kongreso de IFEF — la internacia fervojista organizaĵo aliĝinta al UEA. Plena programo inkluzivas teknikan viziton al lokomotiva remizo, kolorfilmojn pri la francaj fervojoj kaj ekskursojn per aŭtobuso, i.a. al Arles kaj la suda marbordo.

La Kongresejo mem estas "Palais de Champfleury". Kotizoj estas akceptataj ĝis la 20-a de aprilo (50 fr. fr.). Kiu pagas antaŭ la 15-a de marto, tamen, pagas nur 44 fr. fr. Petu aliĝilon kaj detalajn informojn kontraŭ int. resp.-kupono ĉe IFEF-Kongreso, 15 rue Guillaume Puy, F-84-Avignon, Francujo. Simbola aliĝo: 12 fr. fr.



Studenta festo en Helsinki. Fone elstaras la stacidoma turo de la ĉefurbo.

LA JUNA VIVO



**Oficiala organo de TUTMONDA
ESPERANTISTA JUNULARA
ORGANIZO.**

**Respondekas: Robert Lloancy,
LJV, rue de la Marinade,
F-66-Tresserre, Francujo.**

NE ĈIAM LA STELOJ ESTAS VERDAJ!

Tion povas aserti la nova Prezidanto de TEJO, Hans-Michael Maitzen, asistento pri astronomio en Aŭstrio. La novelektita gvidanto, "astronomo, kiu ne perdiĝis inter la nuboj", laŭ taga pariza gazeto Le Figaro, estas la tria prezidanto de TEJO de post la reorganiziĝo en 1957-58. Gravajn taskojn li devos alfronti. Estrarano pri varbado, li devos, per ĉiaj kaj ĉiuj adekvataj rimedoj, kreskigi la membronombron de la Organizo kaj trovi senĉese pli nombrajn abonantojn al "Kontakto", la revuo de la junularo. Li ankaŭ okupiĝas pri lerneaj demandoj.

RENOVIGO DE LA ESTRARO

La daŭra kresko de la organiza problemoj en TEJO postulis pligrandigon de la estraro de 8 ĝis 10 membroj. Ankaŭ menciinda fenomeno estas, ke, forpuŝante multjaran viran monopolon, ĝi akceptis virinan ĉarmon. Sveda flegistino, Ingrid Carlsson, respondekas pri ĝeneralaj servoj de TEJO kaj kulturaj agadoj. Vicprezidantoj estas: Ulrich Lins (Fed. Res. Ger.), respondeculo pri eldonaĵoj, patronaj membroj kaj rilatoj kun UEA; kaj Andrzej Grzebowski (Pollando), pri turismo, kongresoj kaj renkontiĝoj.

Ĝenerala Sekretario estas Humphrey Tonkin (Usono), kies taskoj estas: kunordigi la internan agadon, firmigi la rilatojn inter la landaj sekcioj kaj prizorgi la internan informadon. Tamen nova posteno aperis apud tiu de la Ĝenerala Sekretario. Senad Ĉolić (Jugoslavio) helpas lin per taskoj de vicsekretario; interalie: rilatoj kun la Esperanto-organizaĵoj, edukado de gvidantoj kaj regiona agado. Wouter Pilger (Nederlando), kiu de longe spertis pri financarto, restas kasisto. Li devos tiel elegante kiel kuraĝe solvi la malfacilegajn primonajn problemojn.

Kiel estraranoj funkcias: Hans Bakker (Nederlando), estro de la NEJO-komisiono, grava servo kiel celo estas havigi informojn al la internaciaj neesperantistaj organizaĵoj kaj starigi kiel eble plej fruktodonajn kontaktojn kun ili; Marian Dobrzyński (Pollando), specialisto pri psikosociaj demandoj, respondekas pri raciigo de la laboro, junularaj delegitoj kaj studentaj aferoj; kaj Robert Lloancy (Francujo): rilatoj kun la komitato kaj redaktado de la "Juna Vivo".

Se vi havas specifajn demandojn aŭ emojn labori meze de komisiono (ekz. NEJO-komi-

siono) subgvide de iu el la ĉi-supraj homoj, turnu vin al la koncerna estrarano. Ĉies helpoj estos bonvenaj!

PROGRAMO "PASPORTO"

La junaj geesperantistoj de Argentino lanĉis, antaŭ kelkaj monatoj, la t.n. programon "Pasporto", kiu celas kunordigi la ĉeffamilian interŝanĝon internaciskale, ĉu por individuoj, ĉu por familioj. Dum la venonta jaro, de la 14a ĝis la 18a de februaro, tiuj samaj gejunuloj organizos kampadkongreson en bieno "la nueva florida", apud Rosario. La celo de tiu renkontiĝo estas duobla: unue, kunigi la gejunulojn, kiuj konscias pri lingva diskriminacio kiel grava faktoro disiganta la homojn; kaj due, paroli la Internacian Lingvon por perfektigi ĝian uzon.

La tre komforta bieno ebligas intiman kontakton kun la apuda naturo por pli ol 60 personoj. 5 eksterlandaj gejunuloj povos senpage partopreni. Informas d-ro Rubén Feldman-González, BV. Oroño 866 - "A", Rosario, Argentino.

ANKORAŬ EN SUDAMERIKO

Ne necesas tro foren iri por trovi ankaŭ aktivajn gejunulojn. En Brazilo okazis, la 27an de julio 1968, la dua renkontiĝo de junaj brazilaj esperantistoj, en la turisma urbo Nova Friburgo. Ĉeestis 40 gejunuloj el 7 brazilaj ŝtatoj, dank' al helpo de programo "minipasporto", kiu ebligis gastigadon de foraj gejunuloj.

Gravajn aferojn oni tiam diskutis. La asocio akiris juran statuton, elektis estraron, planis novajn agadojn kaj decidis aliĝon al TEJO. En la nuna momento ni povas feliĉe sciigi, ke la voĉdonintaj komitatanoj de TEJO unuanime akceptis la novan LS. Ni tutkore gratulas la novajn anojn kaj sincere deziras sukcesplenen al la estontaj kunlaboroj.

El la nova landa sekcio de Meksiko f-ino Najera margarita, sekretariino de la junulara asocio kaj nun komitatano de TEJO, sidas maldekstre.



ESPERANTO EN RADIO



Ciujn informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris 16, Francujo. En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa Tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn vidu en la Jarlibro 1968, Unua Parto, p. 120. Mallongigoj: I = Informoj; P = Parolado; K = Kurso.

Ĉiutage

05.30-06.00 Warszawa, ripeto de la antaŭa vespera programo per samaj ondlongoj.
15.30-16.00 Warszawa, 31.50 m (9525 kcs), 25.34 m (11840 kcs). I.P. Pola Radio, Esperantaj disaŭdigoj, Warszawa, Pollando.
22.30-23.00 Warszawa, 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 42.11 m (7125 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 25.09 m (11955 kcs). I.P.
19.30-19.45 Budapeŝt, 240 m (1250 kcs), 48.10 m (6234 kcs), 42.25 m (7100 kcs), 25.19 m (11910 kcs), 30.51 m (9833 kcs), Radio Budapeŝt, Esperanto-disendoj, Budapeŝt VIII., Hungarujo.

Dimanĉo

11.00-11.30 Pekino, 47.69 m (6290 kcs). I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.
11.30-12.00 Muritiba, 190 m (1580 kcs). I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.
12.30-13.00 Pekino, 25.12 m (11945 kcs), 19.89 m (15080 kcs) I.
20.00-20.20 Roma, 50.08 m (5990 kcs), 41.24 m (7275 kcs), 30.90 m (9710 kcs), P. Radio Roma, Esperantofako, Casella postale 320, Roma, Italujo.
20.05-20.30 Sofia, 50.62 m (5920 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.
21.45-22.00 Manila, 25.17 m (11920 kcs). P. Far East Broadcasting Co., Box 2041, Manila, Filipinoj.
22.45-23.00 Valencia, 278 m (1079 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
23.30-23.55 Sofia, 49.42 m (6070 kcs), 31.38 m (9560 kcs). P.

Lundo

00.00-01.00 Sorocaba, 278 m (1080 kcs), I.K. Rádio Clube de Sorocaba, rua São Bento 245, Sorocaba (São Paulo), Brazilo.
12.05-12.15 Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 16.80 m (17855 kcs), 13.94 m (21520 kcs). P. (D-ro A. Baur). Svisa Radio, S.O.C. Bern-16, Svislando.
17.30-17.40 Bratislava, 428 m (701 kcs), 273 m (1097 kcs), 243 m (1232 kcs), 188 m (1594 kcs). K. Radar, Lenin-placo 13/a, Bratislava 1, Ĉeĥoslovakujo.
18.00-18.15 Stoke-on-Trent, 94.9 Mcs (mod. frekv.). K.I. Radio Stoke, Cheapside, Hanley, Stoke-on-Trent (Staffs.), Britujo. (la kvaran lundon de la monato, de 18.00 ĝis 18.30; kelkaj programoj en la angla).

Merkredo

6.45- 6.55 Gdańsk, 230 m (1304 kcs). I. Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk, Pollando.
9.45- 9.55 Bratislava. Kiel lunde.
12.05-12.15 Bern, kiel lunde. (S-ro C. Gacond).
13.45-14.00 Wien, 203 m (1475 kcs), P. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭs-

trujo. (ĉiun alternan merkredon).

14.00-14.15 Stoke-on-Trent, kiel lunde.
23.05-23.30 Bilbao, 212 m (1412 kcs). I. P. Radio Bilbao, Apartado 1117, Bilbao, Hispanujo.

Ĵaŭdo

10.00-10.15 Manila. Kiel dimanĉe.
21.50-22.00 Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 31.27 m (9595 kcs), 25.25 m (11880 kcs). P. (D-ro Baur).
23.05-23.20 Zagreb, 264 m (1133 kcs). P. Radio Zagreb, Jugoslavujo.
23.05-23.20 Beograd, 439 m (683 kcs), 48.78 m (6150 kcs). P. (programo de Zagreb).

Vendredo

13.15-13.30 Rosario, 229 m (1310 kcs). P. Radio Nacional, Cordoba 1331, Rosario (Santa Fe), Argentino.
20.00-20.30 Pekino, 45.32 m (6620 kcs), 45.17 m (6640 kcs), 42.37 m (7080 kcs), 30.43 m (9860 kcs). I.

Sabato

11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.
12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.
20.00-20.30 Pekino. Kiel vendrede.
21.50-22.00 Bern. Kiel ĵaŭde (S-ro Gacond).

RADIO ROMA. 5-I, Tra la literaturo; 12-I, Novaĵoj el Italujo; 19-I, Italaj kanzonoj en Esperanto; 26-I, Leterkesto; 2-II, La manĝoj ĉe la antikvaj Romanoj; 9-II, Kasteloj ĉirkaŭ Saluzzo; 16-II, La glora italino Eleonora d'Arborea; 23-II, La kampanilo de S-ta Marko en Venezio. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto".

RADIO BRATISLAVA. La kurso ĉi-supre anoncata lunde kaj merkrede provizore ĉesis, sed rekomenciĝos en januaro; pro tio ĝusteco de la horo ne estas garantiata.

RADIO WARSZAWA krom la ĉi-supre anoncata ĉiutage programo prezentas "Anguleton por Esperantistoj dum la jenaj nacilingvaj programoj:

— angla merkrede inter 11.00 kaj 11.25 per ondoj 25.34 m (11840 kcs), 19.64 m (15275 kcs);
— germana ĉiutage escepte dimanĉon inter 07.30 kaj 08.00 per ondoj 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 42.11 m (7125 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 25.09 m (11955 kcs);
— itala merkrede inter 12.00 kaj 12.25 per ondoj 25.42 m (11800 kcs), 19.71 m (15215 kcs), la saman tagon inter 21.00 kaj 21.30 per ondoj 50.25 m (5970 kcs), 41.18 m (7285 kcs), kaj dimanĉe inter 11.30 kaj 12.25 per ondoj 25.42 m (11800 kcs), 19.71 m (15215 kcs).

NOTO: La stacioj Bern, Budapeŝt, Pekino, Roma, Warszawa regule sendas senpagan programon de siaj elsendoj al petantoj.

Oficiala informilo

N-ro 419, 1 decembro 1968

Elektio de komitatanoj B

Atentigo al ĉefdelegitoj kaj delegitoj

Laŭ decido de la Komitato de UEA farita en Madrid, en 1969 okazos novaj elektoj, interalie ankaŭ de komitatanoj B. Ilia oficperiodo komenciĝos la unuan tagon de la Universala Kongreso en Helsinko.

Laŭ la Statuto kaj Regularoj de UEA (senpage riceveblaj de la Centra Oficejo) la elekto de komitatanoj B okazas jene:

"La Ĉefdelegitoj kaj Delegitoj elektas el internacia listo... unu Komitatano por 250 Delegitoj. La Vicdelegitoj kaj Fakdelegitoj ne partoprenas tiun ĉi voĉdonon." (Statuto, art. 25). "Je 250 ĉefdelegitoj kaj delegitoj laŭ la stato de la 31-a de decembro de la pasinta jaro estas elektata po unu Komitatano B. Ĉiu komencita ducentkvindeko rajtigas al plia Komitatano B." "Kvin ĉefdelegitoj aŭ delegitoj rajtas proponi unu kandidaton el inter la individuaj membroj de la Asocio; la kandidato devas skribi konsenti al sia kandidatiĝo." (Generala Regularo, art. 28). "Povas esti elektita kiel komitatano... nur persono, kiu estis Membro-Abonanto de UEA almenaŭ dum la 3 jaroj antaŭ la jaro de la elektoj." (art. 30). "Ĉiuj Komitatanoj estas samrajtaj kaj reelekteblaj." (Statuto, art. 25).

En la momento de redakto (nome, antaŭ la fino de 1968) la nombro de elekteblaj komitatanoj B ne estas ankoraŭ certa, ĉar ĝin fiksos la nombro de ĉefdelegitoj kaj delegitoj je la 31-a de decembro. Antaŭvideble, tamen, la nombro estos ĉirkaŭ ses.

La direktoro de la Centra Oficejo petas la ĉefdelegitojn kaj delegitojn (ne la vicdelegitojn aŭ fakdelegitojn) sendi proponojn pri kandidatoj kun iliaj skribaj konsentoj **antaŭ la 1-a de marto, 1969**. La proponantoj bonvolu zorgi, ke la kandidatigoj estu konformaj al la Statuto kaj Regularoj, kaj ke ili atingu la Centran Oficejon (Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando) antaŭ la indikita dato.

Post la forpaso de la fiksita dato, se la nombro de kandidatoj superos tiun de elektotaj komitatanoj B, la direktoro voĉdonigos ĉiujn ĉefdelegitojn kaj delegitojn, kiuj rajtas voĉdoni. Pri la rezulto aperos informo en la gazeto.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al art. 11 de la Generala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj Delegitoj de UEA. Se ĝis la 15-a de marto neniu membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Aŭstralio: Norman Albert Collier. **Brazilo:** Aderaldo Rocha. **Britujo:** W. J. Nesbitt, Frances Eason. **Ĉeĥoslovakio:** Vladimír Sladěček. **Finnlando:** Yrjö Kuorikoski, Aulis Kuvaja,

Seppo Tella. **Germanujo:** Richard Hoppe, Hermann Schmid, Helmut Sonnabend, Milan Sudec, Wilhelm Wingen, Gerhard Kalkhof, Martin Pirschel. **Grekio:** Kimon G. Eliopoulos. **Hungario:** Zsolt Gyarmathy. **Japanujo:** Rintaro Taki. **Meksiko:** Joseph Casto. **Norvegio:** Sigmund Blikshavn, Trygve Reisæter. **Nov-Zelando:** Donald S. Bruce. **Peruo:** Ildefonso Nuñez Beltrán. **Rumanujo:** Alexandru-Bubu Tausciuc. **Soveta Unio:** Jozef Šnejder, Stanislav E. Kotlarov, Jánis Rukšáns. **Svedujo:** Tomas Jansson, Arvid Johansson, Kaj Stridell. **Usono:** Peter J. Benson.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1968)

Aŭstralio: Nambour. **Britujo:** Chorley. **Francujo:** Arès, Nancy (FD Medicino). **Germanujo:** Burtenbach, Ilbeshausen-Hochwaldhausen, Löhne (FD Stenotajpado). **Italujo:** Foligno, Meda. **Nederlando:** Rotterdam (FD Filmarto, Medicino). **Norvegio:** Løten (FD Filatelo, Muziko). **Nov-Zelando:** Wellington (FD Scienco kaj Filozofio). **Svedujo:** Malmö (FD Librotenado), Stockholm (FD SOS-Aŭto-Servo), Trelleborg (FD Skoltismo).

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Dittlof Tjassens-Lips, s-ino M., Den Haag. Field, s-ro Ch. A., Cambridge, Britujo. Grundkötter, s-ro Joh., Landau, Germanujo. Llech-Walter, s-ro R., Perpignan, Francujo. Peschke, s-ino Anni, Esthal, Germanujo. Volk, s-ro Friedrich, Würzburg, Germanujo. Zimmerer, s-ro H., Nordendorf, Germanujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1969

6 Berry, f-ino E.; 7 Kennedy, s-ro D.; 8 Kennedy, s-ino M., Britujo. 9 Ziegler, s-ro Sven, Danlando. 10 Belhoste, s-ro L.; 11 Bernard, s-ro R., Francujo. 12 Beaucaire, s-ro Louis; 13 Behrmann, s-ro Hermann; 14 Bily, s-ro Harry; 15 Fritsch, d-ro Erdmann; 16 Grundhoff, s-ro J.; 17 Hilland, s-ro J.; 18 Hoppe, pastro Richard; 19 Kraft, s-ro T.; 20 Schütt, s-ro H.; 21 Wagner, s-ro Hermann, Germanujo. 22 Dijk, s-ro J. P. van; 23 Luyke, s-ro H. C.; 24 Muller, s-ro J. L.; 25 Ponti, s-ro Dick, Nederlando. 26 Almén, s-ro Helmer, Svedujo.

DONACIOJ (Gld.)

Generala Kaso: Britujo: Phelan, ges-roj G kaj H. K., 3,—. Danlando: Zacho, s-ro P., 25,—. Usono: Murray, s-ro Joseph H., 36,—.


Por T.E.J.O.: Nederlando: Bakker, s-ro Hans, 50,—. (por "Programo Pasporto")

Fondaĵo Canuto (Por membrigi personojn en landoj kun transpagaj problemoj): Germanujo: Peine, s-ro O., 2 MA; Schmidt, s-ro Georg, 2 MA. Nederlando: Moerbeek, s-ro R., 1 MA. I.A.T.: Bakker, s-ro Hans, 4,—; Frost, s-ro, 3,60; Görlich, prof. d-ro, 7,—; Grattapaglia, ges-roj, 7,20; Martens, s-ro, 2,50; Pickel, s-ro L., 2,50.

Propaganda Konto: Germanujo: Lowitzer, s-ro F., 3,—.

Fondaĵo Enciklopedio de Esperanto: Italujo: Stoppoloni, s-ro Umberto, 56,20. Nederlando: Muller, s-ro J. L., 10,—.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo. Universala Esperanto-Asocio



Bernard
Saunier

ANONCETOJ



Erwin
Richter

Tarifo: 0,45 gld. aŭ 1 int. respondkuponon por ĉiu du da vortoj. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondecas sole nur la anoncantoj.

Volonte interŝanĝas poŝtkartojn tutmonde: Esperantokreis Volkshochschule, D-8640 Kronach, Germanujo.

S-ro Mehmet Telyakar, 29-jara, deziras edziĝi kun riĉa fraŭlino el la libera mondo. Adreso: Aydinlik Sokak 23, Ortaköy-Istanbul, Turkujo.

Esperantistaj kolektantoj... abonu "La Esperantista Kolektanto"-n. Specimeno kaj anonceto senpaga. Kunlaboru. Eldonanto: R. Melo, 15 rue de la Richelandière, 42 St. Etienne, Francujo.

Nia klubo aranĝas letervesperon frue en februaro. Skribu al Esperanto-Klubo, Box 330, Wellington, Nov-Zelando. Unu respondo garantiita.

Latva geblindula Esperanto-rondo "Internacia amikeco" la 30an de marto 1969 festos sian dujarigon. Geesperantistoj el la tuta mondo estas petataj sendi gratulkartetojn. Adreso: str. Pales 14, Riga-24, Latvia, Soveta Unio.

Mi deziras interŝanĝi poŝtkartojn kun la tuta mondo. Fotoj estus bonvenaj! Bv. skribi al Erwin Richter, doc. de popolaltlernejo, 8182 Bad Wiessee, Hagngasse 45, Okcid. Germanujo.

Nacikostumajn malgrandajn pupojn prefere el ekster Eŭropo, deziras interŝanĝi s-ino Margareta Kostiainen, Siltakatu 1 A 13, Heinola, Finnlando.

Lun Fung Trading Co., G.P.O. Box 15747, Hong Kong, (1) ĉiam servas al vi, se vi volas aĉeti ion ajn el Hong Kong, (2) ĉiam servas al vi, se vi volas vojaĝi al Hong Kong, (3) serĉas kunlaborantojn tutmonde por organizi internacian komercan servon. Tre bona servo! Tre favora prezo! Bonvolu enketi kaj proponi!

S-ro J. K. Kuller, Mudgegonga 3737, Victoria, Aŭstralio, serĉas amikojn en la mondo, interesitajn en fervojoj, tramvojoj, troleaj veturiloj, agrikulturo, kanal- kaj riversĝipoj. Ne poŝtmarkoj.

Esperanto-Klubo, C.E.G. Lucien Poincaré 55, Bar le Duc, Francujo, organizos letervesperon fine de februaro 1969 (30 gelernantoj 12/17-jaraj). Skribu amase. Respondo certa al ĉiu.

Pol Denis, profesoro, 5, Chemin de Blamecourt, 55 Bar le Duc, Francujo, deziras korespondi per sonbendoj en ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj.

S-ro Saunier Bernard, 76 Caudebec-en-Caux, Louvetot, Francujo, deziras korespondi kun geesperantistoj el ĉiuj landoj. Respondo certa.

Esperanto-Ferioj en Britujo, 16-23 aŭgusto 1969. Restado (du-aŭ tri-litaj ĉambroj) en modesta gastdomo apud Leeds. Limigita al 30 personoj. Prezo £ 18-10-0 inkluzive de ekskursoj. Detaloj pri la ferioj de f-ino W. Hirst, 140 Gramfield Road, Huddersfield, HD4 5QE, Britujo.

Al la ĉefaj geamikoj de gesinjoroj Phelan, ni sendas niajn tutkorajn salutojn kaj am-esprimojn esperante, ke vi ĉiuj baldaŭ povos denove skribi. Gwen kaj Herberto.

Universala Invalida Esperanto-Asocio, Box 5, 5504 Strib, Danlando, deziras kontakti ĉiujn invalidojn kaj handikapitojn de tuta mondo. U.I.E.A. estas kunlaboranta fakasocio kun UEA.

Post korespondanonco, nia grupo ricevis neimagitan nombron da leteroj el la tuta mondo. Ni dankas, kaj pardonpetas pro eventualaj malfruaj respondoj. Al ĉiuj bonan Kristnaskon kaj bonan Novan Jaron. Esperanto-Grupo, prof-ino Ines Corona, via Milano 4, I-09100 Cagliari, Italujo.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Kutimiĝu al internacia parolmaniero per aŭdado de sonbendoj. La Magnetofona Servo de UEA, (2427 Padstow Cres., Clarkson, Ont., Kanado), povas rekomendi al vi modelajn registraĵojn kaj sendi, kontraŭ 1 respondkuponon, kompletan liston de siaj programoj.

KORESPONDEMULOJ !

Se vi publikigos korespondo-peton en nia revuo, kunsendu vian FOTON. Ĉi-monate la redakcio elektos kelkajn fotojn de korespondantoj-anoncantoj por SENPAGA aperigo apud la koncernaj pagitaj anoncetoj! Kaptu la okazon!

En 1969 aperos

LA NOBLA KORANO

eble la plej grava verko de la monda literaturo, kiu ĝis nun mankis en la Internacia Lingvo. Aperos paralele la tekstoj araba kaj Esperanta. El la araba originalo tradukis d-ro Italo Chiussi.

Kontrolis i.a. prof. G. Waringhien.

600 paĝoj plus antaŭparolo.

La verko aperos en la prestiĝa serio

ORIENTO-OKCIDENTO

sub aŭspicio de UEA.

Bindo: ledeca plasto, kun ora surpriso.

La unua eldono en Esperanto ampleksos **nur 500 ekzemplerojn**. Prezo anoncota.

Helsingör

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj de la venonta somero okazos **20.-26. de julio** en **La internacia Altlernejo** de Helsingör. Venu por ĝui belan feriosemajnon en vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
DK-8230 **Abyhøj**
Danlando

NB. Speciala karavano el Helsingör al **UK en Helsinko** estos aranĝita. Ekiro 26/7 matene, alveno al Helsinko tagmeze.

ĈU VI JAM VARBIS NOVAN MEMBRON POR 1969 ?

LINGVOLOGIA REVUO

Lingvologio celas inventi la objektivan universalan gramatikon kaj, konforme al ĝi, gramatike perfektan lingvon.

Abonu senpage malal Emil Hanhiniemi, P.O. Box 764, Ingham, Queensland-4850, AŬSTRALIO.

Herman Hanhiniemi: **MIA KONDUKIGO al la kono de Dio.**

Senpaga 12-paĝa broŝuro malal la sama adreso.

La verkinto de la gazeto rakontas interalie: Jesuo Kristo estis al mi problemo. Fakte mi amis lin pro lia boneco. Sed kial li submetiĝis al tia morto? Leginte Biblion mi emis antipatii Dion pro ke li kiel mia kreinto povis kaj rajtis ĉion kontraŭ mi, sed mi kiel lia kreito povis kaj rajtis nenion kontraŭ li. Fine mi malamis lin tiom ke mi estus volinta torture mortigi lin. Mia amo al Jesuo pliiĝis mian malamon al lia kruela Patro, kiu murdigis sian Fillon pro sia absurda kaprico, ke li ne povis aliel pardoni al homoj. Mia dependeco de tia despoto furiozigis min. Fine mi tamen trovis unu venĝon kontraŭ Dio: Kiam mi malamas vin, Dio, vi malhavas mian amon. Ĉu mian koron povos preni vi, kiu ĉanfaronas: "Mi ĉion faros, kion mi volas, kaj neniu juĝos min." Mi suferis inferon en mia malamo, sed mi ne povis ĉesi malami Dion. Tiam mi ekmemoris la konsilon: Rigardu Kriston. Mi rigardadis lin suferantan sur kruco. Tiam malkovriĝis al mi lia diro: "Mi kaj mia Patro estas unu." Tio solvis mian problemon: Mi ja amas kaj malamas unu saman Dion. Biblio pruvis al mi, ke Jesuo estas "Dio kun ni... la eterna Patro... Dio en kiel Kristo..." Mi ekkomprenis, ke mi, la homo, jam torture mortigis Dion en Jesuo, kaj ke li intence aranĝis tion okazi por ke mi povu ĉesi malami lin kaj povu male ami lin. Do mia propra malamo al Dio estis mia peko, el kio Dio savis min per tio, ke li lasis min insulti, turmenti kaj murdi lin. Ĉar malamon povas satori nur sango, tio ke la malamanto murdas sian malamaton. Mia Kreinto aĉetis al si mian amon pagante pro ĝi sian vivon.

Kompreninte tion mia koro rompiĝis kaj mi laŭdis Dion. Mi saviĝis. Mi enamiĝis al Dio, identa kun Jesuo. Mi feliĉiĝis, liberiĝis. Sed io malpli ol la morto de Dio ne estus povinta revoluciigi mian menson. Mi kredis ke mi nun amas Dion. Mi multfoje petis al Dio, ke certa afero ne okazu al mi. En unu vespero mi konstatis, ke ĝi tamen estis okazinta. Tiam mi koleris al Dio kaj diris malbenojn antaŭ Li. En la nokto mi ne povis dormi pro inkub-songo, kiu daŭre ripetigis. Mi devas ellitiĝi kaj promeni. Tiam mi rimarkis kun teruro, ke la inkubo premas min ankaŭ maldorme.

Mi konsoliĝis per ke tio ĉesos matene. Kiam fine venis la mateno, la anim-spirita plago ne ĉesis. Min kaptis timo, ĉar la angoro estis tute nova kaj fremda, kaj tre stranga kaj forta. Mi decidis labori intense. Sed tio ne helpis min forgesi ĝin. Tutan tagon mi strebis koncentriĝi en laboron plu pli dure, fine kvazaŭ en kramfo. Sed la pezo ellasis min por neniu sekundo. Mia teruriĝo komencis iĝi paniko. Sur mi estis supernatura ŝarĝo.

Venis vespero. La tuta ĉielo estis abscese ruĝa. Mi pensis ke tio estas nur mia iluzio. Tiam mi aŭdis la najbarojn interparoli: "Vidu, la ĉielo koloras strange." Nun mi sentis esti ĉe la limo de katastrofo. Mi ne plu eltenos. Estis tro malfrue al mi eĉ plani memmortigon.

La Sankta Spirito estis foririnta el mi. Mi tute ne sciis penti. Tiam, antaŭ mia definitiva mallumiĝo, Dio grasis min per unu subita rescio. Senhezite mi hastis al la plej proksima kristano, diris mian krimon kaj petegis: Tuj benu min surbaze de la sango de Jesuo Kristo; se mi ne ricevos mian pekon pardonita, mi estas en pereco.

Si faris tiel, kaj senpere la plago foriris el mi. Libera mi ree, savita. Laŭdo al Kristo, la sola helpanto.

NIA LITERATURO

KOLONO DE NIA KULTURO

ESEo-libroj:

originalo:

L. Sinha: Jaroj sur tero.

Rakonto pri infanjaroj en Hindujo, tiam ankoraŭ preskaŭ netuŝita de eŭropa kulturo, pri junaĝaj jaroj kaj kontakto kun Esperanto en norda Eŭropo kaj fine pri longa vivo en hejmlando iom post iom tute ŝanĝita.

126 p., riĉe ilustrita. Bind. 11.50 gld.; broŝ. 8.50 gld.

traduko:

R. Tagore: Malsata Ŝtono.


Sep emociaj rakontoj de la plej glora hinda aŭtoro de modernaj tempoj. El la bengala originalo tradukis L. Sinha.

127 p., ilustrita. Bind. 11.50 gld.

Konstruu kun ni la kolonon.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO (ESEo)

Mendu ĉe UEA aŭ via kutima libroservo.



Por la Semajno de Internacia Amikeco



(16-22 februaro) aperis plaĉaj, dukoloraj

AMIKO-KARTOJ

por salutoj al eksterlandaj amikoj:

(a) **kun saluto-teksto** en la lingvoj angla, Esperanta, franca kaj germana, kaj kun la emblemo de la S.I.A. sur la alia flanko;

(b) **sen saluto-teksto**, sed kun la emblemo kaj, aliflanke, kadro konsistanta el la vortoj "Semajno de Internacia Amikeco" en diversaj lingvoj.

La prezo de ambaŭ specoj estas la sama: po 0,35 gld. por ĉiu karto.

Aperis ankaŭ trikoloraj

DONACAJ AMIKO-KARTOJ

uzeblaj kiel pagilo po 5,— gld. ĉe la Libroservo de UEA:

(a) **kun saluto-teksto** "Kun bondeziroj okaze de la Semajno de Internacia Amikeco", kun la emblemo kaj kun klarigo pri la uzo;
(b) **sen saluto-teksto**, sed kun la emblemo kaj klarigo.

La prezo de ambaŭ specoj estas la sama: po 5,— gld.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando, aldonante 10 % por la sendokostoj.